
**92**
(110)

MARTO / APRILO 1991

ISSN 0150-5823



**Dumonata kultura informilo kaj esprimilo**

Redaktejo: Esperanto, Cargue Sac, F-47470 BEAUVILLE
Unu n-ro: 10 FF. Unujara abono: 60 FF ĝirotaj al:
**CERCLE AMICAL ESP. AGENAIS, pĉk 3371 74 M Bordeaux**
(mencii same sur bankĉekoj!) Nia tel.: 53 95 40 26

*****************************************************



# VIDPUNKTOJ

***Laŭte!*** *estas informilo de Amikeca Rondo Esperantista, do ni ĉiuj legantoj, kaj okaze redaktantoj de artikoloj, povas nin konsideri kiel amikojn, kiuj libere diskutas. Preskaŭ neniu inter ni estas profesia politikisto, ekonomiisto, gazetisto, estro de partio ktp, ni estas simplaj homoj kiuj diskutas amikece pri la nunaj problemoj. Tial ni povas doni nur proprajn opiniojn aŭ vidpunktojn. Kompreneble, ĉiuj el ni havas tre diversajn opiniojn, kiuj varias laŭ la personoj, la aĝo, la konoj, la spertoj. Plej multaj el ni eble estas simplaj francaj civitanoj, kaj nenion spertis ekster Eŭropo. Aliaj havas spertojn pli vaste tra la mondo, aŭ vivas en medioj tre malsimilaj al tiuj de okcidentaj landoj. Tio faras la riĉecon de* ***Laŭte!****, kie dank'al Esperanto oni povas facile interŝanĝi vidpunkt-*


*ojn, informojn el malproksimaj landoj. Teorie, ne devus esti personaj insultoj, ĉiuj rajtas havi proprajn opiniojn.*

*Kelkaj diskutoj povas ŝajni vanaj, vera dialogo de surduloj. Sed fakte, kiam oni redaktas, prezentas opiniojn, ne estas nepre por konvinki la kontraŭulojn, sed por klarigi propran vidpunkton. Ekzemple, mi estas ateisto, mi ne intencas konvinki iun ajn al ateismo. Mi deziras nur montri kaj defendi la valorojn de ateismo, por ke junulo, kiu hezitas, havu vidpunktojn de ambaŭ flankoj; ankaŭ la dikredantoj propagandas. Same pri aliaj temoj: sennaciismo, internaciismo, pacismo, socialismo, ktp...*

*La ĉefa, unusola celo estas informi per diskutoj inter anoj pri diversaj vidpunktoj. Ĉiu defendas siajn proprajn opiniojn sincere, ne pli. Tamen tio konstituas bonajn temojn por **Laŭte!** kaj kontribuas al la intereso de la revuo.*

***J. DEKER***

*******************************************************



Paralele al la Golf-sporto :
Nova epizodo de la elektronika milito...

## DENOVE : LA AFERO PRI IRAKO

Depost mia skribo pri la persgolfa krizo presita en n° 91a de **Laŭte** aperis grava libro, en la franca, kiu donas novan lumklaron pri ĝia disvolviĝo, kaj pensigas pri ebleco de eĉ tre granda friponaĵo.

Tiu aludita libro subskribita far Pierre SALINGER kun helpo de Eric LAURENT, eldonita far Olivier URBAN (prezo 120 FF, reklamo ne pagita!) titoliĝas **"Guerre du Golfe : le Dossier secret"** (Golfmilito: sekreta dokumentaro). SALINGER estas fama usona gazetisto, kvankam li vivas jam de pluraj jaroj en Franclando, bone konas la Usonan politikon, li estas sampartiano de CARTER, kaj bone konas KISSINGER; li estis parolprenanto de prezidento KENNEDY, kaj estas estro de ABC-televido por Eŭropo kaj Mezoriento.

Kaj nun jen kio gravas; jam komence de jaro 1990a, Saddam Hussein petis kompenson far Kuvajto kaj Saŭdarablando, pri la teruraj kostoj de la iraka milito kontraŭ Irano, ĉar tiu milito protektis tiajn sunaismajn landojn kontraŭ la ekspansie ŝijaisma Irano. Se vi bone memoras, dum tiu milito Israelo tre diskrete helpis Iranon pro timo al Irako. Militfine, Irako estis borde de bankroto, ne nur nenion obtenis de la araba solidareco (Irano estas ne nur ŝijaisma, sed ankaŭ nearaba), sed male, kontraŭ la reguloj de OPEP (Organizo de la landoj eksportantaj petrolon), ekis superproduktado de nafto cele al malaltiĝo de la petrolprezo, kio estis rekta financa agresado kontraŭ Irakon. ("Per capita", la petrolproduktkapablo de Irako estas 5500 bareloj dum tiu de Kuvajto estas 45000 bareloj: pli ol okoble).

Tiu stranga Kuvajta konduto rezultis rekte de kontrakto inter Kuvajto kaj la usona CIA (Centra sekreta interkonsentiga agentejo: Central Intelligence Agency): la teksto de tiu kontrakto estas en la libro: ĝi estas la unua nodo de la tuta krizo.

Tiam Saddam Hussein minacis Kuvajton per invado, se ne okazos ŝanĝo de sinteno. Jam de la 17a de julio, la preparoj por alkuvajta invado estis tute videblaj sen reago de la en Irako delegitaj senatanoj Robert DOLE el Kansas kaj Alan SIMON el Wyoming. La 25an de julio, Sinjor-

ino April GLASPIE, ambasadoro de Usono en Irako, kaj James BAKER, vic-sekretario usona por la mezorientaj aferoj, deklaris al Saddam Hussein, ke **"okaze de alkuvajta invado, neniu kontrakto, neniu promeso devigus Usonon perforte oponi"**. Ĉu tio ne povis esti interpretebla far Saddam Hussein kiel "verda lumo" por ekagi, kaj ke Usono konsideras tiun disputon kiel pure interaraban aferon?

Salinger pretendas (li estas Usonano kaj defendas Usonon, kio estas tute normala), ke tiu pli ol mola sinteno estis nur senintenca "eraro" venanta el la fakto ke Usono tiutempe estis tute fokusita al reunuiĝo de Germanlando kaj ĝia plua aliĝo al NATO. Ĉu tia "eraro" estas kredebla, se oni scias ke BUSH estis pli frue estro de C.I.A.? Ĉu oni ne povas, almenaŭ samvalore supozi ke Usono tiutempe traktadis kun Sovetio liberan agadon en la persa golfo kaj libera reunuiĝo de Germanlando, kontraŭ libera agado de Sovetio en Baltaj landoj, en Gruza Soveta Respubliko (Georgio), Armenio, ktp...?

La 3an de aŭgusto, Hussein deklaris sin preta retiri siajn trupojn ekde la 5a de aŭgusto, se la diskutoj interarabaj komenciĝos inter Hussein de Jordanio, Jasser Arafat, Saŭdarabio, Magrebaj landoj kaj Egiptolando.

Tiam Hassan II-a de Maroko kaj Fŭad el Saŭdejo konsentis, ke estus juste, ke Irako rericevu de Kuvajto la parton de ĝi, kun petrolo kaj alirejo al la maro, kiu estis distranĉita far la Angloj. (La restanta parto estis forprenita el Saŭda Arablando).

Tiu interaraba interkonsentebleco estis torpedita far Usono pere de aĉetita Mubarrak, kiu rifuzis subskribi. (Lia egipta lando kun multnombra loĝantaro kaj tre malriĉa nepre bezonas la usonan helpon).

Tiam Hussein estis jam en la kaptilo metita de Usono.

Post la konkero de Kuvajto, la Sekurec-konsilio de Unuiĝintaj Nacioj decidis premon kontraŭ Irakon per embargo, t.e. blokado de ĉiuj varoj en- aŭ el-irantaj la landon. Hussein deklaris ke UNO havas falsajn pesilojn por kompari kion li faris kaj kion Israelo faris al arabaj palestinanoj. Li ligis sian retiron al organizado de internacia konferenco por juĝi ĉiujn nesolvitajn aferojn en Mezoriento (ĉefe Palestino). Usono forte oponis, kaj ĉiam de antaŭe, fiaskigis faktajn sekvojn de pluraj kondamnoj



al Israelo far UNO. Usono komencis premegi al la Sekurec-konsilio por ricevi permeson almiliti Irakon post ultimato finota la 15an de januaro, ne parolante pri internacia konferenco kiel proponis la franca registaro kaj kelkaj aliaj: tio estis propre postulo pri "senkondiĉa kapitulaco", kvazaŭ neakceptebla de Irako.

Britlando sekvis pro sama petrola avantaĝo kiel Usono, Franclando sekvis blinde sed kun trenantaj paŝoj, ĉar ĝi bedaŭris siajn rilatojn kun la islamaj landoj; Sovetunio sekvis sen oficiala diskuto, sed kelkajn tagojn poste, oni konstatis, ke ĝi atakis la baltajn respublikojn, kiel frue Gruza Sovetio (Georgio), sen ia reago de Usono. Ĉu golfon kontraŭ Baltoj? Ĉinio, kiu komencis bandaĝi la vundojn de la afero de Tjen an Men kaj bezonis kunlaboron de Usono por progresigi siajn industrion kaj komercon, tamen ne jesis, sed sin detenis. Demando estas, ĉu laŭ artikolo 27a de UNO oni rajtas decidi militon nur per tutjesa unuanimeco, aŭ eĉ kiam estas unu sindeteno en la konstantaj membroj? (Mi mem ne scias). Ni rimarku, ke se nur unu lando voĉdonus "kontraŭ", kio estas meti sian vetoon antaŭ la Sekurec-konsilio, tiam Usono devus meti la kuvajtan aferon antaŭ la ĝeneralan asembleon de UNO, kies decido bezonas aprobon de 2/3 el la 133 ŝtatoj, el kiuj multaj estas islamaj, kio estus certe obstaklo por preni tian ekstreman decidon.

Ĉiuokaze, post tiu UNO-decido Saddam Hussein estis plene falinta en la kaptilon.

Kial tiu daŭra agresema konduto de Usono kontraŭ Saddam Hussein, kiu sendube diktatoras, sed ŝajne ne estas fanatikulo? Lia ministro pri eksterlandaj aferoj, TAREK AZIZ estas kristana, kio okazus nek en Irano, nek en Saŭdarabio, nek en aliaj emirlandoj de la Golfo, nek en Sirio, nek en Turklando, nek en Alĝerio, nek en Maroko, nek en Tunizio, nek en Israelo. Kaj, laŭ mia scio, ŝtatoj kiuj bredis terorismon estas Libio, Sirio kaj Irano (kiu ankoraŭ tenas okcidentajn ostaĝojn en Libano), kaj tiuj ŝtatoj estas almenaŭ momente samflanke al Usono. (Do, same por ni...)

Pri tiu konduto ni ne havas nek povas havi certecon, sed nur hipotezojn. Ĉu tiu usona agado estas nur aventurema, kiel antaŭ jarcento la vakeroj de la "farŭesto"? Ĉu ĝi estas nura rezultato (kiel diras Salinger) de stultaĵo

(erare humanum est, sed perseverare diabolicum, eraro estus ebla, sed kun tia persisto?...) Ĉu ĝi estas movata de la Israela timo antaŭ Irako, kaj de la multnombra juda premantaro en Novjorko? Ĉu ĝi fontas el la firma volo sekurigi por Usono la petrolo-fontojn? Ĉu tio estas preparo al **Pax americana**? Sed **kia** paco?


Fine, ĉu vere la pura franca intereso nepriĝas nian partoprenon al la Golfa milito? Nia ŝtatorganizo sin deklaras "demokrata" (t.e. "regado far la popolo mem"). Pri tiu plej grava afero de paco aŭ milito, ĉu antaŭe oni vin konsultis? Ni ne revu, krom en antikva Ateno, mi kredas, ke neniam registaro kuraĝis tion fari... Fine ĉu eblus, kiamaniere? Referendume? Kiel estas en Svislando?

Ni rimarku, ke inter la islamaj landoj, Irako havas 18 milionojn da loĝantoj, sed Irano 50 milionojn, kaj Turkolando 50 milionojn. Tiuj landoj ne estas kvietaj, estas en ili ekstremaj islamanoj kaj minoritatoj. Ni ankaŭ ne forgesu, ke la soveta armeo restas sampotenca, ke ĝi havas 370 000 soldatojn en orienta Germanlando, 70 000 en Ĉeĥoslovakio, 50 000 en Pollando kaj 60 000 en Hungarlando, entute 540 000 soldatojn, kiujn ĝi ne retiris pretekstante ke ĝi ne havas lokon por ilin loĝigi en Sovetio, dum ties registaro pretendis ke de post la aranĝoj kun Bush oni liberigis en Sovetio mem 400 000 soldatojn, do, kio veras? Kie loĝis do tiuj 400 000 soldatoj?

Se pruviĝas senkonteste ke nenia pacaranĝo eblas antaŭ fina venko kontraŭ Saddam Hussein, ĉu estas tute ekster imago, post tiu totala venko, ke iu "CHURCHILL" kiel post la venko en 1945a leviĝus kaj ekkrius: "Per ĉiuj diabloj, ni do buĉis la malĝustan porkon?"

Mi do preĝas, por ke rapida, ĝusta kaj eble justa intertraktado ĉesigu tiun militon. Sed granda malavantaĝo de homoj kiel mi, estas ke mi ne scias al KIU preĝi...

J. MANCEAU







# VORTOJ DE MALJUNULO

----
valo
----

## NOVA MODO EN SAT-MEDIO

*Dum longa tempo sufiĉe multaj SAT-anoj kutime ciumadis inter si, donante al tiu kutimo signifon de amika intimeco. Nun ĝi estas forlasata, kaj oni volonte imitas la viumadon de la neŭtralaj esperantistoj. Kelkaj kamaradoj eĉ propagandas, kaj rezonas por pravigi tiun ĉi tendencon. Kial?*

*Iam Kalocsay pretendis, ke Zamenhof, kreinte la pronomon* ***ci****, tuj mortigis ĝin, kaj ke de tiam ĝi estas mortinta. Nu, Kalocsay estis brila stilisto, kaj estas vere, ke Zamenhof skribis en la Fundamento : "anstataŭ "ci" oni uzas ordinare "vi" ". Li mem aplikis tiun uzadon ne nur ordinare, sed ĉiam senescepte.*

*Sed Zamenhof ankaŭ starigis la Fundamentan Krestomation por konsistigi modelon (la vorto troviĝas en la antaŭparolo). Ĉu en la Krestomatio estas la pronomo ci? Jes, unu fojon (nur unu fojon ja, sed signife), en "Versaĵo sen fino" de Felikso Zamenhof.*

*... Ekamis la konato,*
*Kaj reciproke ŝi.*
*Post paso de monato*
*Ŝanĝiĝis "Vi" per "ci".*

*Tiu ununura ekzemplo akcentas la intimecan karakteron de la pronomo.*

*Ni nun pli funde esploru la demandon. Ofte ni diras, precipe ni SAT-anoj, ke nia lingvo estas logika. Kio estas pli logika ol diri "vi" al pluraj personoj kaj "ci" al unu?*
*Mi tamen konsentas, ke esperanto devas esti ne nur lo-*

gika, sed ankaŭ vivanta. Ĝi do akceptu la tradicion de ĉiuj vivantaj lingvoj, almenaŭ tiuj de okcidenta civilizacio, kiuj ĉiuj havas la "Vi" de ĝentileco.

Sed ili havas ankaŭ (krom unu escepto, nome la angla), la "ci" de intimeco. Nur la angla diras "vi" al ĉiu unuopulo (krom Dio), kaj mi pretendas, ke al ĝi mankas tiu "ci" de intimeco. Kial vi volus, ke ni trudu al nia lingvo tiun saman mankon? Ni esperantistoj riĉigu nin per ĉio, kion provizas aliaj lingvoj, ni prenu nian bienon tie, kie ni ĝin trovas : ni adoptu la pronomon "ci" el la lingvoj franca, germana, hispana, itala ktp.

Konklude, en praktiko :

Mi ĉiam diras "vi" al iu nekonata, ĉar mi ne scias, ĉu la logika "ci" ne ŝokus lin. Sed mi volonte diras "ci" al amiko aŭ kamarado, vira aŭ ina, kiu konsentas kaj volonte reciprokas. Kaj mi petas, ke oni ne pretendu trudi al mi pseŭdo-regulon, kiu ne ekzistas en la Fundamento. La pronomo "ci" ne estas mortinta. Ni daŭrigu vivigi ĝin.

## NOSTALGIO

Marto 1912.

La pasaĝerŝipo "Urbo Orano" ĵus trapasis la antaŭhavenon La Guleto, kaj majeste naĝas sur la blua maro kap' al nordo, al Marsejlo.

Stare sur la ferdeko, kubutapoge ĉe la pavezo, 12-jara knabo rigardas retroen. La urbo kun altaj minaretoj, tute blanka en sia verda zono ĉe la piedoj de montoj Zaguan kaj Bu-Kornin, malrapide foriĝas. La knabo intense rigardas. Liaj okuloj pleniĝas de larmoj.

30-an de aŭgusto 1990.

La knabo fariĝis 90-jara praavo. En la aŭto de sia filo li forveturas de la cevena urbeto mole kuŝanta sur la fundo de la verda mallarĝa valo, profunda inter kaŭsoj*. La maljunulo intense rigardas la rapide malaperantan urbeton. Li sentas sin preskaŭ plorema kiel la iama knabo.

Ĉu antaŭsento, ke li neniam plu revidos sian karan Florakon, kiel li neniam plu revidos Tunizon?

* kaŭso, fr. causse : kalka altebeno.



## KVAZAŬ TESTAMENTE

Venis aŭtuno, baldaŭ venos vintro. Je mia aĝo, mi ne estas plu longe vivonta. Tial mi prizorgis la destinon de mia kadavro.

Jam longe mi pensis donaci ĝin al medicina fakultato, sed mi supozis, ke tiel maljuna restaĵo ne interesus ĝin. La ekzemplo de mia amiko Bartelmes modifis mian opinion. Mi informiĝis, kaj eksciis, ke la anatomia laboratorio de la fakultato de Montpeliero akceptas tian donacon en kiu ajn aĝo. Mi do plenumis la koncercan formalaĵon, kaj la afero estis tuj aranĝita.

Post dissekco kaj bruligo de la pecoj, la cindrojn oni dissemos en la naturon. Tiel mia kadavro ne okupos eĉ plej etan areon de la tersurfaco.

De mia korpo restos nur kelkaj bildoj (fotoj kaj kinofilmoj), kaj voĉ-registraĵo en kasedo.

Mi ne kredas pri pluvivo de la "animo". Mi scias, ke tiom longe, kiom vivos miaj geamatoj, ili konservos viva mian memoron : jen estas la sola postmorta vivo, pri kiu mi kredas, kaj al kiu mi aspiras.

De nun atendante la finon, mi tiom longe kiom eble strebados dediĉi almenaŭ iom da tempo al la esperanta afero.

## ESTINTECO, ESTONTECO

Niaj legantoj eble rimarkis, ke en miaj lastaj "Vortoj" temis ofte pri mortintoj. Kompreneble en mia memoro estas pli multaj mortintoj ol vivantoj.

Tamen mi multe pensas pri tiuj ĉi, precipe la junaj, kaj pri la vivontoj : la nun naskataj kaj la baldaŭ naskotaj infanoj. Al ĉiuj ĉi mi deziras feliĉan estontecon.

Bedaŭrinde la hodiaŭaj cirkonstancoj ne promesas kantantajn morgaŭojn.

La teknika progreso havigis al ni komforton kaj multajn oportunaĵojn : aŭtomobilon, telefonon, radion, televidon ktp. Ĉu ni estas tial pli feliĉaj ol niaj avoj?

Niaj nepoj ĝuos pliajn progresojn, eĉ nun neantaŭvideblajn, apenaŭ imageblajn. Ĉu ili vivos pli feliĉe ol ni? Mi volas esperi jesan respondon, sed mi timas, ke la estonteco liveros nean respondon. Se nur mi povus preĝi... aŭ iel influi la evoluadon de la aferoj kaj okazoj...

## KOMPARO

*Dum longa tempo en Francio oni riproĉis al la anoj de la komunista partio, ke ili obeas ordonojn el Moskvo.*

*Ŝajne neniu rimarkis, ke la francaj (kaj alilandaj) katolikoj same ricevas ordonojn el Romo - pli precize el la Vatikana ŝtato, ĉefloko de tutmonda respubliko, kies elektita dumviva prezidento suverene regas super milioncentoj da konsciencoj.*

*Iam Stalino ironie demandis : "Kiom da divizioj disponas la papo?" La caro de Sovetio kaj de Kominterno ne konsciis, ke la estro de la katolika Eklezio, sen armeo kaj sen armiloj, estas pli potenca ol li kun siaj kirasaj divizioj.*

*Ne nur la romkatolika Eklezio, sed ankaŭ la rusortodoksa nun evidentiĝas pli forta ol la marksista-leninista partio. En la konkurenco inter diversaj klerikalismoj, la komunista ne eltenas la komparon kun la tradiciaj religiaj.*

*Kial? Ĉu ne tial, ke ĝi pretendis apogi sin sur pozitivaj faktoj, facile kontroleblaj, dum la aliaj estas bazitaj sur nekontroleblaj kredoj?*

## ALIA PLEZURO

*Ĉiutage venas al ni juna portugala mastrumistino, diligenta, gaja, afabla. Ĉar estas nun ferio en la lernejo, venas ankaŭ ŝiaj du filoj, Nuno (Manuel), naŭjara, kaj Joakín, sesjara. Ili ludas en la ĝardeno en plena akordo, kaj, dum la mallonga restado de mia pranepo Francisko, ili same triope ludis malgraŭ la aĝa diferenco. Kiam estas tre varme posttagmeze, je la horo de la movdesegnoj, kiujn ili aparte ŝatas, mi ŝaltas por ili la televidilon. Iafoje mi montras al ili bildolibrojn, kaj komentas, kiel faras ĉiuj avoj kaj avinoj en la mondo. Ekstere, kiam estas malpli varme, mi iom partoprenas en iliaj ludoj. Ilia pepado, kiel tiu de la birdetoj, gajigas la ĉirkaŭaĵon.*

*Jen estas ankaŭ plezuro, kiun mia maljuna edzino kaj mi povas ankoraŭ ĝui. Por ni la vivo ofte estas malagrabla, sed dank'al la ĉirkaŭa juneco kaj infaneco, ĝi estas bela.*



## JARŜANĜO
### En pesimismaj perspektivoj

*Okaze de la nova jaro pluraj geamikoj de **Laŭte** sendis al mi bondezirojn, kiuj varmigis mian maljunan koron. Mi dankas ĉiujn, kaj donas informojn pri mia nuna stato.*

*Nun mi marŝas facile, sed malrapide kaj lamete, kun bastono en mano pli pro singardo ol pro vera neceso. Mi aŭdas ne bone, sed orelaparato efike korektas tiun difekton. Mia maldekstra okulo, la sola, kiu ankoraŭ vidis, estis trafita de angia akcidento (vejna trombozo), kaj mi ne povas plu skribi nek legi.*

*Resume : mi estas lama, surdeta, preskaŭ blinda - kaj 91-jara.*

*Nu, sufiĉe pri miaj personaj mizeretoj. Mi ja ne rajtas plendi. Mi hontus plendi, dum multege pli gravaj kaj ĉagrenaj aktualaĵoj trude kaptas nian atenton kaj niajn zorgojn.*

*Komenciĝis nova milito. Kiom ĝi kostos? Kiom da mono, da ruinoj, kaj precipe da homaj buŝoferoj? Kiom da vundoj, da kripligoj, da sango, da kadavroj? Kiom da senkulpuloj pereos pro Rajto, pro Patrio, pro nacia prestiĝo, sed fakte por plej granda profito de petrol- kaj armilvendistoj, kaj aliaj industriestroj kaj financistoj. Kiu ja profitas de milito? Al tiu demando elokvente respondas la fluktuoj de la borsokurzoj laŭ la novaĵoj el Mezoriento.*

*Dume, pacistaj organizoj vokas al kontraŭmilitaj manifestacioj. Ili pene kolektas kelkajn milojn aŭ dekmilojn da partoprenantoj, kiam milionoj devus kune leviĝi kiel unu homo, kaj laŭtege krii sian abomenon kaj sian rifuzon. Ŝajnas eĉ, ke en ĉiuj landoj la plimulto el la civitanoj aprobas la militemon de siaj respektivaj registaroj.*

*Ĉu do iam la popoloj ekkonscios pri la stultegeco de tiuj sangaj aventuroj?*

*Ĉu iam ili komprenos, ke milito solvas nenion, sed kreas krom teruraj suferegoj, novajn problemojn kaj novajn danĝerojn?*

*Ĉu iam finfine la homaro fariĝos prudenta kaj saĝa?*

*Ho homoj, kompatinda frenezularo!*

*Rimarkoj*

*1) La gazeto* ***Washington Post*** *taksis la probablajn elspezojn de Usono por tiu milito. La redaktisto kalkulis je pluraj dekmiliardoj da dolaroj, kaj konkludis: "Tio kostos multe al la usona ŝtato, sed donos vigligan vipobaton al la industrio, kaj entute estos bonefika por la usona ekonomio." Do, sume, bona afero!*

*JAURÈS diris : "La kapitalismo portas en si la militon, kiel la nubo portas la fulmotondron." Oni povas aldoni: "La milito grase nutras la kapitalistojn."*

*2) Lia Prezidenta Moŝto Saddam Hussein, ekscampiono de la laikeco kaj nekredanto, ordonis, ke oni brodu sur la irakaj flagoj la vortojn* ***Allah akbar*** *(Dio estas granda) jes, kaj Tartufo ne estas mortinta*.*

***VALO*** *(diktita al mia filino)*

** Tartufo, aŭ la falsa devotulo : komedia persono, tipo de hipokrita bigoto kreita de Moliero.*

## FAKTOJ KAJ VORTOJ
## PERLOJ KAJ GEMOJ

*En nia jarcento perfektiĝis la arto vesti krudajn faktojn per logaj ĝentilaj vortoj. Mi ne estas maljunulo, mi estas aĝa persono. Kriplulo estas handikapulo, kaj frenezulo estas mensa handikapulo. Ne ekzistas mizeruloj, ili estas ekonomie malfortaj.*

*En tiu arto superas niaj registoj kaj politikistoj. Je ĉiu vorto elparolata ili ellasas po unu perlo aŭ gemo, kiel la pli juna filino de la vidvino en la fabelo "La feino".*

*Bela perlo falis el la buŝo de la franca ministro pri Nacia Defendo (He! jen estas nova ekzemplo: Antaŭe oni diris ministro pri Milito!) Do nia ministro sinjoro JOXE diris : "Francio ne estas en milito." Ha! ni serenigite spiras pli facile. La francaj aviadistoj, kiam ili disĵetas bombojn sur Kuvajton aŭ Irakon, ne faras militon, Dio gardu! ili nur plenumas mision. Verŝajne en la kadro de la Nacia Defendo kelkajn milojn da kilometroj for de la naciaj limoj. Do, francaj civitanoj, trankvilaj en via heksagono ne atingebla de irakaj batalilo j, admiru, kaj aplaŭdu vian bravan registaron, kiu de malproksime kondukas tiun ne-militon.*

*Tamen, sinjoro MITTERRAND, ŝtatestro kaj supera ĉefo de la armeoj, ne timas paroli pri milito, sed atentu : pri justa milito. De post 1914 ni konas la rekantaĵon : "Francio neniam partoprenas en milito, krom justa." Vidate de nia flanko, tiu ĉi milito estas justa. De la kontraŭa flanko ĝi estas sankta. Justa, sankta, belaj epitetoj; kiam la abomena nomo milito estas per ili ornamita, ĝi aŭreoliĝas de pura gloro.*

*Ho! vortoj, belaj vortoj! Kiom da krimoj vi kaŝas sub via bombasto!*

## SIMPLA KALKULO

*Sinjoro ROCARD, franca ĉefministro, postulas de siaj kolegoj, ke ili ŝparu sume 12 miliardojn da frankoj el siaj buĝetoj. Tio koncernas ĉiujn ministrojn krom tiu de la "Defendo", kiu male ricevos tiun sumon aldone al sia propra buĝeto kaj malavare elspezos ĝin por la bezonoj de la milito.*

*Dek du miliardoj da frankoj egalvaloras 2,4 miliardojn da dolaroj laŭ la nuna kurzo.*

*En la sama tempo ni estas informataj pri minacanta malsatego en Afriko. Necesus unu miliardo da dolaroj por savi dudek milionojn da homoj.*

*Komparu :*

*1) En la tuto de la bonstataj landoj estas problemo por trovi unu miliardon kontraŭ la malsato, tio estas por la vivo.*

*2) En la sola Francio ne estas problemo trovi pli ol du miliardojn por la milito, tio estas por la morto.*

*Sen komento.*

## PURA, MALPURA...

*Freŝdata novaĵo el la milito kaŭzis ian emocion en la mondo. En Bagdado estas mortigitaj centoj da homoj. Iuj francaj gazetistoj hipokrite rimarkigas, ke ne ekzistas pura milito: milito estas esence malpura. Kaj jen la neatendita konkludo: ni devas akcepti ĝin tia, kia ĝi estas. Al mi ŝajnas, ke povus esti alia konkludo: Ni devas rifuzi ĝin, kia ajn ĝi estas.*

***VALO***

## ANGORO

*La suno estas strange malvarma,*
*La arboj pro sufero ŝtoniĝas;*
*La birdo estas muta*
*Kaj la floro senviva.*
*La arĝentrivero ruĝiĝas*
*Pro la sango de la homoj*
*Murditaj dum milito.*
*Printempo, ĉu vi riskos reveni*
*Por plekti esperkronojn,*
*Por ke la floro de la frateco*
*Flirtu kiel flago*
*En la mano de ĉiuj homoj?*
*Printempo, ĉu vi riskos reveni?*

**Michèle Freud**

*"Oni mortigas unu homon : oni estas murdinto.*
*Se oni mortigas milionojn da homoj, oni estas konkeranto."*

*Lord Byron*

## PREĜO

*Hieraŭ vespere,*
*Mi vidis plori la stelojn,*
*Mi vidis flui larmojn da lumo,*
*Mi aŭdis iliajn kosmajn plendojn.*
*Certe ili ege timis*
*Tiujn bruegajn, fantastajn birdojn,*
*Kiuj ne kantis amkanzonojn*
*Sed militkanton, mortrekantaĵon,*
*Ĉar ili havis en sia ventrego*
*Grapolojn da teruregaj bomboj.*
*Por detrui la bluan planedon.*
*Steloj, kandeloj de l'espero,*
*Viaj larmoj transformiĝu*
*Je muziko kaj amrozo*
*En la koro de la homoj!*

**Michèle Freud**





36a ĉenletero de L!

## PRI ŜANĜOJ EN LA LINGVO

Pri tio jam ofte estis debatite. Tamen tiu temo ŝajnas al mi plu aktuala - eble pli - interesinda.

Mi kredas, ke tiuj modifoj estis elvokataj jam tempe de Zamenhof, aŭ malmultan tempon post li.

Mi memoras pri du el ili. La unua estas, ke la vortoj kun finaĵo **-ĉo** sonas ne tre bele, iom peze, kaj post esploroj **-ĉo** aspektas malpli internacia ol la finaĵo **-cio** proponita.

Tiel ekzemple "kondi**ĉo**" fariĝus "kondi**cio**". Tamen hodiaŭ **-io** estas tre uzata en landnomaj finaĵoj. Ĉu ne estas risko pri konfuzo?

Estis ankaŭ proponite enkonduki la literojn **Q, X, Y, Z** en sciencajn vortojn, por ne havi konfuzon kun jam ekzistantaj komunaj substantivoj.

Sed tiajn ŝanĝojn oni tiam ne volis fari por ne doni neseriozan, nefidindan bildon pri lingvo certe ankoraŭ ne ĝenerale agnoskita.

Tamen kontraŭantoj ĉiam trovos motivon. Ili povas diri ankaŭ, ke tiu lingvo ne estas belsona, ne kapablas sin adapti en scienca, teknika, kultura, riĉiĝinta mondo.

Do, ĉu ni devas plu atendi? Kaj ĉu tiuj modifoj koncernas nur la Akademion? Se mi bone komprenis ĝian rolon, ĝi estas ĉefe kontrola. Restas ni la uzantoj. La eŭropa kaj monda situacio pli konsentas pri tio.

Aŭdacu ni, kaj pruvu la movon marŝante.

**J.C.**

**Garolo : NE, AL ŜANĜOJ EN LA LINGVO**

Jen malsimpatia temo de J.C. Tamen **Laŭte** estas la plej simpatia tribuno, debatejo kiun mi konas en la Esperanto-mondo.... Mi pensis ĝuste pri tio dum mi legis la ĵus ricevitan n-ron 89. La revuo (tribunalo, ĉu ne?) fariĝis familiara, jes preskaŭ familia, por mi fariĝas intimaj la kunlaborantoj. Mi ekzemple kunvivas kun amiko Valo, ne nur ĉar mia pensmaniero estas praktike tute sama kiel lia sed ĉar mi sorbas liajn vortojn, kiuj transdonas plenan vivforton, en klarvido vere enviinda. La longaj polemikadoj pri di-diabloj kaj naci-sennaciismo kun Jakelino estas edife ĉarmaj. La pantunetado de mia alia amiko Ergoto de Bonaero, kies ergoto kutimas piki, plejofte estas trafa, precipe kiam temas pri lia esperantalo; kiu ĝuste estas la nuna temo.

Mi persone neniam ion opinias pri lingvaĵoj, unue ĉar tio ne estas mia fako, kaj due mi estas nur modesta uzanto de la lingvo, kiu klopodas sin esprimi per tiu instrumento, idealeca kaj ja relative simpla kaj logika. Sekve, mi neniam sukcesis kompreni kial ĉiu esperantisto bezonas samtempe sin prezenti kiel kompetentan reformiston de ĉi tiu jam klare strukturita lingvo kiu estas Esperanto. Strange, tio ne okazas en aliaj lingvoj, neniu, pro iu ajn motivo kuraĝas sugesti, prezenti "ŝanĝojn", "perfektigojn" en siaj kutimaj idiomoj, kial tio okazas en Esperantio? Kia bizara manio! (- kaj la vorto "bizara", kiu ne nepre apartenas al la "esperantala" ĵargono, estas necesa por fortigi la ideon, kaj estas en PIV).

Mi ja opinias, ke post la fundamenta gramatiko kaj normiga vortaro, nenio plia estas necesa por ke ĉiuj Esperanto-uzantoj, kiuj kompreneble devas havi la minimuman konon de la lingvo, povu en la tuta mondo kompreni unu la alian. Konsekvence, mi al ŝanĝoj diras ne, dum al riĉiĝo per evoluo mi diras jes, sed kondiĉe ke ni sekvu la normojn tradicie establitajn ekzemple en vortaroj (perfektaj aŭ ne) kiaj PIV. Tiam ĉiuj komprenas la vorton "bizara", kiun mi pro kaprico ne inventis sed uzis, ĉar mi pensas ke tiu vorto estas taŭga!

La ekzemplon de J.C. por ŝanĝo de **ĉo** al **cio** mi povas taksi nur kiel idiotaĵon... kaj insisto pri tiaj reformoj evidente estus konduko de Esperanto al pereo.

Ni cetere ĵus travivis pliajn batalojn (ankaŭ en **Laŭte**) pri la finaĵo **io**, ekzemple Koreo-Koreio ks. Estas interese noti ke ankaŭ la esperantistoj facile perdas sian raciecon, ĉar ja la sufikso **io** estus logika, racia solvo por la finaĵo de ĉiuj land-naci-nomoj, sendepende de multaj subtilaĵoj pri gentoj kaj ŝovinismaj sentoj, sendepende de mensaj masturbadoj de la lingvistoj kaj akademianoj. Por ekzemplo en la komenco de la jarcento oni uzis nur la landnomon "Brazilio"... sed iom post iom nun oni iras al "Brazilo", eĉ en SAT. Ĉu la braziloj fariĝis malpli gentaj? Kiaj stultaj rezonoj kaj sintenoj, kiuj ofte igas Esperanton ridinda por lernantoj. Sed kion fari?

Pri la uzo de fremdaj literoj kiel Q,X,Y ktp. en sciencaj kaj teknikaj fakoj, mi ne kredas ke povas aperi problemoj, ja de jarcentoj la homoj uzas la grekaj alfabeton k.a. sen la minimuma konfuzo.

La bona iniciato pri fakaj terminaroj sendube alportas la lingvan necesan normon pri kiu mi aludis, por garantii la tutmondan integrecon de nia lingvo.

For la lingvan onanismon de la esperantistoj, ne al ŝanĝoj... krom se tiuj esperantistoj celas detrui Esperanton!

***Ĵanseb : LA LINGVO ŜANĜIĜIS PLI OL ONI KREDAS...***

*La propono de J.C. starigas tri gravajn demandojn:*
*1) Kiel trudi al la esperantistaro ŝanĝojn kiel uzi "kondicio"-n anstataŭ "kondiĉo"?*
*2) Kiu faros ilin?*
*3) Kiu pagos la reeldonon de la vortaroj?*

*Ĉar supozeble maltujos la respondo al tiaj demandoj, mi disponas pri iom da tempo por paroli pli ĝenerale pri alie grava ŝanĝo en la lingvo: la vortprovizo.*

*Jen. Zamenhof pruvis, ke* ***milo da vortoj sufiĉas*** *por ke malsamlingvanoj komuniku bone pri kurantaj aferoj. Kiam li kreis la lingvon, estis en ĝi malpli ol 1000 vortoj. Nun estas pli ol 10000. Tio pruvas, ke:*
*- aŭ Zamenhof eraregis, kaj lia lingvo estis dekoble nesufiĉa ;*
*- aŭ la plejparto de la nunaj vortoj estas superflua.*

*Tio pruvas ankaŭ, ke la lingvo ne nur ŝanĝiĝis, **sed ŝanĝegiĝis**. Skribi "kondicio" anstataŭ "kondiĉo" estas kiel akneo sur la pinto de la nazo, kompare al la dekobliĝo de la lingvo! Imagu ke via edzino estus je 600 kg peza, anstataŭ 60! Ĉu tiam vi opinius, ke nenio ŝanĝiĝis?*

*Je..es, vi diros, sed temas pri nombro, ne pri kvalito. Esperanto, kun 10-oble pli da vortoj, restas Esperanto!*

*Ne, ĉar Esperanto difiniĝas kiel simpla lingvo, **facile lernebla de ĉiuj**. Nun, ĝi ne plu estas tia, krom se ni fi-argumentas kiel iuj anoj de la angla, konfuzante la lingvajn nivelojn : "la angla estas simpla, ĉie oni parolas ĝin", forgesante aldoni ke temas nur pri balbutado, ne mastrado - kiu postulas multe pli da klopodoj. Sed esperantistoj estas tro honestaj por tiel fie argumentaĉi.*

*Kial esperanto tiom kreskis? Estas natura fenomeno. Ĉar Esperanto estas natura lingvo, vivaj homoj parolas ĝin kaj bezonas vortojn por nomi aferojn. Estas ĝojinde ke **Esperanto vivas**. Do estas natura emo por aldoni neologismojn. Bedaŭrinde, ne ekzistas **malneologismoj**, t.e. vortoj kiujn oni forĵetas el la lingvo pro malofta uzo. La afero estas unudirekta : oni rajtas aldoni vortojn, sed nek forĵeti nek ŝanĝi ilin. La lingvo povas nur kreski, kaj kreski kaj kreski... De kiam vorto eniras en la lingvon, ĝi sankciiĝas kaj oni ne plu rajtas tuŝi ĝin!*

*Se ni deziras, ke Esperanto evoluu, sed ne ŝanĝiĝu en sia esenco, ni devas vole kaj oficiale aldoni al la lingvo meĥanismon por **forĵeti tiom da vortoj** kiom oni aldonas. La malneologismoj ne estos forgesitaj, sed estos nur literaturaj vortoj, kiujn normala esperanto-uzanto ne bezonas koni por skribi legindan leteron aŭ artikolon.*

*Alivorte, mi klopodas por ke estu agnoskita distingo inter **BAZA Esperanto** - respondanta la difinon de Zamenhof : facila lingvo por ĉiuj - kaj **LITERATURA Esperanto**, lingvo de Esperantianoj (kiel ni nomas la popolon de Esperantio) - funkcianta kiel iu ajn alia lingvo,*



*t.e. kreskanta, postulanta posedon de aparta kulturo, ktp.*

*Multaj diros, ke jam estas baza Esperanto, t.e. la aro de la plej simplaj vortoj. Bedaŭrinde, tiu ideo estas falsa, pro du kialoj :*

*1) La ideo pri "simpla vorto" estas tute **subjektiva** : Estos baldaŭ tiom da "bazaj" Esperantoj kiom da esperantistoj mem.*
*Iu elektis neologismon "bizara", prefere ol "oda" aŭ "zeltzama". Ĉu la fundamenta "stranga" ne sufiĉis? Ja ekzistas "strange" en la angla, "strannyi" en la rusa, kaj "estraña" en la hispana. Aŭ, se la angla ne konvenas, eblas ankaŭ kunmetaĵoj kiel "nenormala" aŭ "malkutima". La fakto, ke vorto similas al iu, kiun vi ofte aŭdas en via nacia lingvo, ne pruvas ke ĝi estas simpla.*

*2) Se ne estas klara limo inter baza kaj literatura Esperanto, iom post iom aperos skalo, laŭ kiu oni taksos la esperantistojn laŭ lingva nivelo : tio tute kontraŭas la ideon pri **lingva egaleco**.*

*Nur tiu distingo ebligos al ni respondi sen kontraŭdiro al argumentoj koncerne nian **kulturon** - pri kiu multaj neesperantistoj ne komprenas kiel ĝi povas kunesti kun lingva simpleco kaj logiko.*

**Patriko** : Mi estas el la nombro de tiuj, kiuj opinias, ke ŝancon havos E° nur per radikala transformiĝo.

"Kondicio" pli logikas ol kondiĉo. Sed ankoraŭ pli logika estus : "kondiciono" aŭ "kondisjono", ĉar tiel ni havus : kondisjoni, kondisjona, kondisjonala, kondisjonalo, dekondisjoni, rekondisjoni ktp...

En slavaj lingvoj estas formo : "kondicija". Sed la adjektiva derivaĵo estas : "kondicionalni"...

En E° estas konfuzo pri verbaj kaj substantivaj radikoj :
Produkti/o/ado/aĵo
Konduki/o

Mi proponas :

| | (France) | | | |
|---|---|---|---|---|
| Konduki | conduire | kondusjono | /dukto/ | duktoro |
| Produki | produire | " | " | " |
| Induki | induire,enduire | " | " | " |
| Seduki | séduire | " | " | " |
| Deduki | déduire | " | " | " |
| Reduki | réduire | " | " | " |
| Traduki | traduire | " | " | " |
| Ekskonduki | éconduire | " | " | " |

Por ekzemplo : "se ni metas la sufikson "iz" vice de ig-iĝ, ni konstatos, ke la latinizasjono de Esperanto konstituas plej glatan vojon al sia internasjonalizasjono aŭ, per aliaj vokabloj, ke sin latinizante, nia linguo plifasile internasjonalizos sin."

En tiu ĉi ekzemplo de reformo de E° la litergrupo "sj" estas prononcebla kiel ŝ kaj ne plu restas ĉapelitaj literoj, kio estas avantaĝo por komputoroj...

Ankaŭ eblas formeti la akuzativon krome de pronomoj (min, vin, sin...) aŭ en ĉiuj cirkonstancoj...

"Anke eblas formeti l'akuzativo salue pro homoj, aŭ en tutaj sirkonstansoj"

"En vico de internasjonalizasjono povas esti metata internasjonizo, ki semper pli internasjonalas ol "internaciigo"..."

"En vico/stato de internacionalizaciono povas esti metata internacionizo, ki semper pli interacionalas ol/ok "internaci igo"..."

Notu la similecon inter "nasjonalizasjono - nasjonalizi" kaj aliflanke la angla kaj hispana tradukoj : [ neŝonolaizeiŝon - nasjonalisasjon] [neŝonolaiz - nasjonalisar].

"EN KONKLUZJONO, MI APELASJONAS KI S'INTERESAS AL PROJEKTO REFORMI NIA INTERNASJONALA LINGUO EN SENSO DE PLI DA LATINESO, MI KONTAKTI POR KE NI JUNTE EKSLABORU KONKRETAJ PROPOZISJONOJ POR UN LATINESPERANTO."

***Nicole D.*** *: Mi ne estas sufiĉa sperta, kapabla pri la la lingvo Esperanto kaj ĝenerale pri lingvistiko por proponi modifojn kaj juĝi, ĉu taŭgas la ŝanĝoj dezirataj de iu persono.*



*Mi pensas, ke rapide lingvo estus fuŝita, se laŭ propra inspiro, laŭplaĉe, iuj ŝanĝus la regulojn, la vortojn. Lingvo, kaj ĉefe Esperanto, perdus sian rolon, iĝus hermeta, rolus nur por inicitoj, ĉar estus malfacile kontroli, recenzi, scii la ŝanĝojn. Kontraŭantoj havus pliajn, pravajn motivojn por rifuzi Esperanton.*

*Estas necese, ke nur akademio rajtu efektivigi seriozajn ŝanĝojn proponitajn de ĝiaj membroj aŭ de la uzantoj.*

*Certe vivanta lingvo devige evoluas. Ju pli bone la uzantoj konas lingvon, des pli lerte ili kapablas riĉigi siajn esprimojn kaj ankaŭ havi propran stilon, personecon.*

*Ĉar necesas sin perfektigi per lernado, praktikado de lingvo por ŝvabri ĝin, ĉefe se temas pri Esperanto, kiun trafas antaŭjuĝoj.*

*Ŝajnas al mi, ke Esperanto sin adaptas al teknikoj, sciencoj, ĉiuj kulturaj esprimoj. Rolo de akademio estas oficiale agnoski novajn vortojn kaj dissciigi ilin.*

*Nuntempe tro da homoj fuŝas, malriĉigas eĉ sian propran patrinan lingvon per misuzado de vortoj, per esprimoj pli kaj pli onomatopeaj, skemaj, per uzado de tro da superlativoj... Ni, esperantistoj estas kuraĝaj kaj aŭdacaj, se ni kontraŭas tiun "modon" - sed tio estas alia debato...*

**Suzanne** : Ja nuntempe estas modo modifi iujn lingvojn - i.a. la anglan, hispanan, francan - celante, laŭdire! - faciligi ilian lernadon. Tiam la lingvoj fariĝos unuformecaj, kiel okazas sur pluraj kampoj en la nuna socia stato - do misa modifo, ĉar ĉiu lingvo ne plu havos sian specifon. Mi ĵus aŭskultis viglan debaton pri la... "modifeto" en la franca lingvo ; tiu faro estas la rezulto de iaj influoj - pro propraj, eĉ politikaj interesoj. Oni ne konsultis, antaŭe, iujn fakulojn kaj tre koncernatajn homojn, konsekvence oni eldonu novan vortaron. Ĉu la esperantistoj eldonos novan PIV-on?

Por ne gravaj ŝanĝoj kiel "kondicio" : Al franclingvano tiu vorto proponita apartenas al vortoj, pri kiuj la lasta

broŝuro de Valo temas : **Faux amis / Faux parents...** . Nia nuna E-lingvo ebligas teknikan, sciencan mondan interŝanĝon; ĝi pruvis sian kapablon trakti sciencajn temojn. La libro **Likenoj de Okcidenta Eŭropo** estas pruvo. Esp-o permesas trakti altnivelajn temojn per simplaj vortoj.

Laŭ mi, ne necesas forigi vortojn, nek aldoni. Kompreneble, krom la novaj vortoj pri scienco, tekniko aŭ pri nuntempa vivmaniero.

Jes, iuj diros : "Ĉe la komenco, ĉiujn ŝanĝojn, sur ĉiuj kampoj, oni konsideras maloportunaj, sed poste iuj estas juĝataj oportunaj. Tamen, tio ne signifas, ke estas bone proponi ion ajn. Endas bremsi tian vortinflacion, tio estas la rolo de la Akademio.

***Oksana : VIVANTA LINGVO***

*Karaj, por mi Esperanto estas vivanta lingvo. Tio signifas, ke ĝi senĉese evoluas, ekz. en leksikono iuj vortoj iĝas arkaikaj, aliaj vortoj anstataŭas ilin. Tio estas natura procezo. Agacas min esperantista malsano - "reformemo". Ial multaj ĵus bakitaj esperantistoj ne volas kontentiĝi pri la lingvo tia, kia ĝi estas, sed sentas devon "plibonigi" ĝin. Sincere dirante, mi preskaŭ neniam legas "plibonigajn" projektojn, opiniante tion perdo de tempo. Nu, se iu skribas al mi en letero : "kara Olgino", mi protestas kaj rimarkigas al la skribinto : "Bv. uzi ŝulcaĵojn en via rondo, sed bv. ne nomi min tiel. Mi estas Olga." Agacas min malsana emo raciigi Esperanton ĝis ekstremo. Tio kondukas al stultaĵoj kaj ridindigas aŭtorojn de tiaj projektoj. Al iu ŝulcisto mi jam proponis ŝanĝi pseŭdonimojn Stalin kaj Lenin - ja temas pri inoj, ĉu ne? Krome : mia amikino Lena forte protestas - esti Lenino ŝi ne volas!*

*Kio rilatas kromajn literojn, mi mem sentas bezonon pri litero Y. Sen ĝi transskribitaj ukrainaj nomoj sonas tro nekutime kaj kriple (kompreneble, por mi. Kiu ne scias ĝustan prononcon, akceptas i anstataŭ y). Mi konstatas ke mi ne estas konsekvenca en mia uzo : jen Mikola, jen Mykola, jen Ihor Kalinec, jen Ihor Kalynec ktp. Laŭ mi, ĝuste la propraj nomoj estas tiom forte ligitaj al niaj gepatraj lingvoj, ke ilin ni tre malfacile rifuzas modifi laŭ ebloj de Esperanto. Tial oni senĉese proponas kromajn literojn.*

*Pri la Akademio. Post la elĉerpa batalo pri landnomoj mi tute ne emas paroli pri ĝi. Se l'Akademio neglektas la multjardekan tradicion de enlandaj esperantistoj (temaj pri koreoj kaj ukrainoj) pri uzo de ilia patrolanda nomo kaj trudas sian formon, mi ne sentas devon obei ĝiajn ukazojn. Des pli ke neniu ukazo povas ŝanĝi la tradicion. Se temas pri viva lingvo. Kaj Esperanto estas viva lingvo! De la 1973-a jaro (kiam mi esperantistiĝis) mi uzas la landnomon "Ukrainio" por mia patrolando, mi ne perfortos mian langon en 1990, nur ĉar grupo da akademianoj decidis rebapti ĝin al "Ukrajno".*

*Laŭ mi, fina vorto en ĉiu prilingva demando apartenas al uzantoj. Tial mi ne panikas kaj ne lamentas pri verkoj de Karolo Piĉ (tre talenta verkisto) kaj abundo de neologismoj en liaj verkoj. Kelkajn el ili uzantoj uzos, aliaj restos kiel eksperimentaj vortoj.*

*Mi ne sentas bezonon ion ajn ŝanĝi en Esperanto. Pli grava tasko por ĉiu esperantisto estas jena : persiste studi la lingvon, konstante pliáltigi sian nivelon. Kaj por la Akademio : studi la lingvouzon de esperantistoj, studi fontojn kaj doni rekomendojn surbaze de tiuj studoj, ne surbaze de siaj propraj preferoj.*

*Kio estas belsona al iu persono, ne nepre estas sama por alia. Ni do ĉesu "plibelsonigi" Esperanton! La lingvo estas realaĵo kaj ni pensu pri enhavo de niaj verkoj, paroloj ktp., ne pri "belsoneco" (eco tre subjektiva) de tiu aŭ alia vorto. Mi povas kompreni veon de kelkaj esperantistoj, ke jen "malbele sonas tiuj* ***sciuro, scii!*** *" - por anglalingvano malbele sonas "Kiel vi fartas?" ktp. ktp. Je tio mi respondas : "kaj min ĝenas artikolo LA - neniam mi scios kiel uzi ĝin!" Ni povas fari longan liston da "ĝenaĵoj" kaj "malbelaĵoj". Same kiel en ajna nacia lingvo. Sed ĉu pro tio oni modifas lingvojn?*

*Uzi, praktiki la lingvon - jen LA TASKO. Flua parolado ĉiam estas bela, sed se oni stumblas ĉe ĉiu sekva*

*vorto, pene serĉante necesan vorton en memorkestoj, eĉ la plej perfekta stoko da bezonaj vortoj ne helpos!*

**Marcelo Leereveld** (Aŭstralio) : KIEN ESPERANTO ?

Estas mirige kiom nescience, kiom lude, kaj kiom senrespekte la kompatinda lingvo Esperanto estas traktata kaj fuŝata de la Esperantistaro. En sciencaj rondoj neniam eblus ekzameni kaj trakti studaĵon tiom neserioze kaj mallogike kiom ni faras tion pri Esperanto : la scienca mondo nur ridus aŭ afable ridetus. Feliĉe por Esperanto la ne-Esperantistaj lingvistoj ne scias pri nia diletantismo (kaj pro ameto ante Esperanton mi neniam mencias tion al ili); se jes, ili havus fortan propagandaĵon kontraŭ nia lingvo. Kaj ili pravus, kvankam ili malpravas pri ĉiuj aliaj siaj kritikoj al Esperanto.

Mi ne plendas pri la kontribuantoj de **laŭte!**, kiuj ja ne bezonas esti lingvistoj. Mi nur plendetas ke ili tro ŝafe akceptas la fuŝadon ante la lingvon ate de niaj lingvistoj, verkistoj, kaj vortaristoj (en tiu rilato la apero de P.I.V. estas la plej detruiga bato kiu povis donati al Esperanto : ne pro ĝia parta enhavo de gramatikaj eraroj kaj neologismaĉoj, sed ĉar ĉi-laston la senkritika samideanaro blinde alprenas kaj ekuzadas). Ne, mia plendo koncernas tiujn, kiuj devus scii pli bone, nome la verkistojn, la vortaristojn, kaj precipe la lingvistojn (inkl. de la Akademianoj). Ilia traktado ante Esperanton estus priridata en ĉiuj sciencaj rondoj ne-Esperantistaj. Tio rilatas speciale al du popularaj tendencoj kiuj estas degenerigantaj Esperanton : 1-e la gramatika "liberigado" kaj 2-e la dronigo ante Esperanton en maro da novaj vortoj prenitaj el naciaj lingvoj, la neologismoj.

La preteksto por la unua fuŝado, la gramatika liberigado, estas ke la lingvo devas "kreski". La vera kialo estas la manko de klereco necesa por solvi ĉiujn gramatikajn problemojn en la kadro de la de Zamenhof genie kreitaj reguloj. Estas naŭzige kaj senesperige aŭdi eĉ Akademianojn sekvi tiun tendencon, kiu neeviteble ŝanĝos la bonegan Esperanton en malprecizan esprimilon similan al etnaj lingvoj, en kiu la gramatikaj reguloj, kaj tial la signifoj, ne plu estas fideblaj. Cetere ĉiuj gramatikaj problemetoj (Zamenhof ja nature ne povis krei Esperanton centprocente perfekta) povas solvati sen neologismoj (kiaj la monstra "far") kaj sen ŝanĝo (aŭ "liberigo") de gramatikaj reguloj ; inter tiaj la malpreciziga signifmulteco de "de", la formado de kunmetitaj vortoj geografiaj, la kontraŭregula pluformado de la ordaj numeraloj kaj de la adjektivaj pronomoj, kaj la nelogika inversa vortordo. La kaŭzo de la nenecesa "riĉigo" (= balastado) pere de nenecesaj neologismoj estas simplaj mallaboremo kaj animfacileco. Estas pli facile, kaj kostas malpli da tempo, preni kaj uzi nacilingvan vorton ol pene trovi vorton aŭ vortkombinon uzante nur Esperantajn radikojn kaj afiksojn. Kelkfoje mi mense devas serĉi dum horoj por trovi la plej bonan Esperantaĵon eblan. Verkistoj ĝenerale ne povas doni al si la tempon por serĉi Esperantan esprimon nekonatan aŭ novan, do ili simple uzas nacilingvaĵon (nomante tion necesa neologismo). Sed la tasko de la lingvistoj estas trovi ĉiujn tiajn Esperantaĵojn. Ĉar ili ne faras tion (kial?), la rezulto estas ke la vortaristoj publikigas ĉiujn nenecesajn nacilingvaĵojn (kiaj gemuta, bunta, starto, verdulo, negi, parki) uzitajn de la verkistoj. Laŭ la leĝo de la neelirebla cirklo la ordinara Esperantistaro (inkl. la lingvistojn) prenas tiujn nenecesajn neologismojn mencitajn en la vortaroj kaj uzadas ilin. La procedo daŭras kaj la rezulto estas ĉiam "pliriĉiĝanta" Esperanta vortaro, ĉar la vortaristoj, speciale P.I.V., deziras registri ĉiujn neologismojn proponitajn, el kiuj la granda plimulto estas superflua.

Tiel la genia lingvo Esperanto degeneros ĝis etnosimila lingvo kiu ne plu valoros lernati, ĉar konstrue simila al la etnaj lingvoj malprecizaj kaj daŭre ŝanĝiĝantaj. Kompatinda Esperanto!



# Ĉies Voĉo

## SCIENCO KAJ RELIGIO

Sub tiu titolo, en sia broŝuro **Tambur-Eĥo** p.20, Ergoto de Bonaero lerte prezentas inĝenian paralelon inter la scienco kaj la religio. (Kiu religio? Ĉar estas multegaj religioj kaj sektoj. Mi jam aŭdas respondon : kiu ajn : ĉar ĉiuj religioj donas sub diversaj formoj la saman superan instruon. Nu, kial do ili tiel ofte intermilitas? Sed mi ne insistas : ni akceptu tiun universalan ekumenismon).

"La scienco donas nenian absolutan scion." Tute certe. Ĝi ja donas nur sciojn relativajn kaj provizorajn. Ĝi procedas per sinsekvaj alproksimiĝoj, el kiuj ĉiu nova pliprogresigas la scion. "Ĝi okupiĝas pri mondo materia konsistanta el fenomenoj". Jes. Mi dirus : pri konkretaj aferoj, eksperimente konstateblaj kaj, kiom eble, mezureblaj. "Tial ĝi troviĝas je malsupra nivelo".

"La religio (...) donas absolutan scion (...) ĝi okupiĝas pri mondo nemateria (...) nevideblaj manifestiĝoj, - kaŝitaj kaŭzoj -, tial ĝi troviĝas je supera nivelo, kaj estas perfekte kaptebla de nia sagaca intuicio". Mi resumas laŭ mia modesta kompreno :

La scienco donas nur malsuperajn verojn, kiujn oni povas konstati kaj kontroli. La religio liveras superan absolutan veron, nekontroleblan, kiun oni devas kredi.

La scienco, paŝon post paŝo, progresas kaj pliperfektiĝas, kaj ĝi neniam atingos perfektecon. La religio, "situante super aŭ ekster la tempo", estas perfekta, do ne pliperfektigebla.

Pardonu mian obtuzan komprenon aŭ malkomprenon, sed en tiu brila ekspono mi vidas nur senpruvajn asertojn, pri kiuj mi ne povas kredi. Mi estas konstatema kaj kontrolema, ne kredema : tio estas manko en mia naturo.

**VALO**



## PRETER LA STULTECO DE DIKREDADO

**El la lavango de l'kredado.**

Subite de kelkaj semajnoj mi troviĝis envolvata en debatoj pri dioj kaj ateismo. Unue, kvankam ja ateisto, mi kutimas legi preter la preĝoj sed por akompani la pensojn, la bultenon "**Brazila Katoliko**" kie Georgo O. Vaske ĝuste kiel B. Aunis konsideris la ateistojn kiel stultulojn. Mi do kun respekto reagis. Due, jen eĉ antaŭ la alveno de **Laŭte!** n°90 mi ricevis de mia amiko Ergoto de Bonaero la broŝureton "Fajna Marketro" kaj "La lorno por vidi Dion!", mi rapide legis la enhavon tuj pensante trovi la cititan lornon... Bedaŭrinde nenio tia okazis. Trie mi partoprenis esperantistan renkonton en urbo **Niteroi**, kie inter aliaj stultaĵoj oni entuziasme preĝadis al ĉiuj eblaj dioj por eviti la nunan militon... la postan tagon la milito eksplodis! Kvare mi ricevis **Laŭte!** n°90 kaj min trafis la stulteca psikotransformisma ŝoko de B. Aunis.

Feliĉe en **laŭte!** mi min sentas hejme, en komforto, ĉar mi scias, ke Valo (kun aŭ sen Lorulot), Suzanne Calas, Renée Meurant, Edgard Jamart kaj kelkaj aliaj apartenas al tiu stabo de stultaj liberpensuloj, ateistoj kiel mi.

**La "malpleno" en la homaj mensoj.**

La Di-kredantoj (kun aŭ sen la absolua "fido" de Ergoto) ne devas forgesi ke ankaŭ la ateistoj posedas la intelektan kapablon, kiun ĉiuj homoj senescepte posedas, eĉ se tiu kapablo ne estas same forta kaj efika ĉe ĉiuj. Kaj por ni, la ateistoj, male al la "kredo" de la dikredantoj, tute ne ekzistas "malpleno" en nia menso.

Ni, la ateistoj, konsideras ke la intelekta kapablo, nia inteligenteco, manifestiĝas laŭ du manieroj, unue per la racio, kio estas la plej grava, kaj due per la mistiko, kiu al nenio kondukas krom ĝuste al la religioj... aŭ al la esprimoj abstraktaj de la poetoj, filozofoj k.s. Ĉiu kaj ĉiuj homoj havas tiujn du kapablojn, ĉu de raciaj rezonadoj, ĉu de mistikaj interpretoj rilate al la aferoj kiuj ĉirkaŭas nin en nia vivo. La dikredantoj estas esence mistikaj, la ateistoj estas esence raciaj, kompreneble ankaŭ la dikredantoj posedas iom da racio, same kiel la ateistoj ne sukcesas komplete fuĝi de la mistiko.

Kiel ĉiuj tion scias, la racio estas tiu homa kapablo (mensa strukturo) per kiu la homoj malkovras kaj formulas la leĝojn de la universo, kaj utiligas ilin en scienco kaj tekniko por laŭeble plibonigi sian propran vivon (se la homo utiligas la racion ankaŭ por detruo, estas alia afero, cetere multe pli mistika ol racia!). La malkovrado de tiuj naturleĝoj samtempe alportas kelkajn klarigojn al kelkaj fenomenoj de ekzisto, kiuj ĉirkaŭas nin. Evidente tio ne sufiĉas por plene kontentigi nian homan menson, kiu avide volas ĉion scii, koni, klarigi. Estas momento, en la nuna stato de evoluo, de racia kapablo, kiam la scienco ne plu donas la klarigojn, kiujn nia menso scivole atendas. Estas momento, kiam nia intelekta kapablo konstatas la neklarigeblon, la nekoneblon, tiam aperas en tiu sama menso la absurdo de la universa ekzisto inkluzive nian propran. Ĝuste tio estas, kion la homo ne volas akcepti : la absurdon, la neklarigeblon... kaj en tiu momento aperas la savtrabo, kiu estas la mistiko.

La mistiko estas la esotera interpretado de la aferoj kaj ekzistado k.s. en paraboloj, en alegorioj, en "fido", kiel nia amiko Ergoto tion tiom bone prezentas al ni ; do mi ne insistos pri tio, nur ke tiuj kabalecaj galimatioj, vortoĵongladoj, por la raciemaj homoj absolute nenion signifas, kiel tre klare tion ekspliki kaj demonstras nia amiko Valo.

Per simplaj vortoj, la mistikuloj, la dikredantoj anstataŭigas la nekoneblon, la neklarigeblon, la nekompreneblon, la absurdon de ĉio kio estas ĉirkaŭ ni, kaj kiun la racio ankoraŭ ne sukcesis atingi, per la nenion signifanta vorto Dio (kun aŭ sen majusklo). La dikredantoj ŝtopas la truon de sia menso, la "malplenon" de B. Aunis, per alia malpleno, kiu estas la vorto dio, nur alia vorto, kiu nur difinas superhomajn estaĵojn kultatajn de la propraj homoj, do sen iu ajn signifo kaj valoro preter la mistiko. Tiel estas.

*Evidente la ateistoj, la raciaj homoj tute ne vidas la "malplenon" fronte al la nekompreneblo, absurdo ktp. Ili tute nature, sen la minimuma mensa traŭmato akceptas la fakton kaj evidente per sia racio klopodas antaŭeniri en la scienca malkovro de la naturleĝoj, kaj ili ne estas tiom stultaj, ke ili anstataŭigas neklarigeblaĵon per alia absurdaĵo, kiu estas la vorto dio. Nur.*

*Ni scias, ke ĉe la homo la mistiko estas pli forta ol la racio, kaj laŭ mia propra statistiko pli ol 90% el la homoj estas dikredantoj. Tiu konstato tute ne estas pruvo pri la ekzisto de dio, ĉar estas nature, ke ĉiuj homoj, kiuj havas la pli-malpli samajn kapablojn (inter ili estas la mistika interpretado) sekvas la saman linion, en ĉi tiu okazo, la kroĉiĝon al la malplenon, kiu estas dio. Kio, ĝuste per racio, ne estas pruvo.*

***La naturo estas belega!***

*Strange ke la mistikuloj ĉiam starigas la samajn naivajn demandojn. Kiel vi klarigas la naturon?... Kio pri la naturo?... Se vi kredas je la naturo (ja la ateistoj ne bezonas kredi je la naturo, ĝi ekzistas eĉ se ĝi estas neklarigebla) vi estas dikredanto...ktp. Nia amiko Aunis same kiel Vaske el la citita **"Brazila Katoliko"** prezentis tiun infanecan demandon: "Per kia miraklo la naturo fariĝas belega!" Mi tute ne scias ĉu mi estas "alia klera ateisto" post Valo, sed mi, kiu pli-malpli zorge legas **Laŭte!** de multaj jaroj, scias ke kamarado Valo daŭre prezentas la miraklan belecon de la naturo en sia ŝatata Florako kaj alie.*

*La naturo fariĝas belega por ĉiu homo, kiu konscias pri sia esenco, pri sia vivofonto, tute sendepende de dio. Kiam mi ĝuas la naturon (kaj mi vere nur ĝuas la naturon kaj ĝiajn fruktojn!), mi tute ne bezonas pridemandi ties ekziston aŭ mian propran; la fakto, la ekzisto per si mem estas plene sufiĉa, same kiel tio okazas ĉe la aliaj specioj ("esperantala" vorto, specio, kiun mi preferas disde speco). La ateistoj tute ne bezonas ĉiumomente demandi al si, kiu kreis ĉion tion, kia supera forto, kia dia miraklo? Tiuj, kiuj tion faras, laŭ mi, estas mensdebiluloj, kiuj provas kuraci sin per mensa, intelekta, mistika masturbado. La ateistoj ne bezonas masturbi sin... almenaŭ ne en la naturo!*

***La serĉa serĉo de l' lorno por vidi dion!***

*Ergoto de Bonaero estas bonhumora humurfaranto (mi ne parolas esperantale sed precize, ĉu ne?)kaj de tempo al tempo ni interŝanĝas ideojn rilate al niaj respektivaj skribaĵoj. Evidente inter ni la "vidado de dio" estas nepreterpasebla barilo, mi restas blinda, do la lorno tute ne utilas, kaj Ergoto estas escepta vortĵonglisto, ĉu en la pantunofarado, ĉu en la interpretado, fabrikado de lornoj por vidi dion. La kabaleca psikotransformismo de liaj karaj Uspensko kaj Gurdiefo estas bonaj ekzemploj. Mi nenion aldonos ĉar mi nur ripetus tion, kion feliĉe k-do Valo jam diris, kun avantaĝo, ĉar Valo havas mensan paciencon por "studi" la Biblion kaj mi ne.*

*Kaj mia kompatinda, aminda patrino klopodis por doni al mi la lornon. Mi kiel infano estis baptita (do enkondukita ĉe dio) konfirmaciita, kaj devis sorbi ĉiujn katekismojn imageblajn ĝuste el la Biblio... kaj mi ne sukcesis vidi tiun diablan dion! Kio evidente tre ĉagrenis mian patrinon.*

*Preskaŭ dekon da jaroj poste, jam en alia kontinento, mi devis gvidi kursojn pri Esperanto, kaj jen mi ateisto daŭre troviĝis fronte al deko aŭ dudeko da homoj, kiuj estis spiritistoj... kaj kompreneble ili provegis konverti min, ankaŭ ili volis prezenti al mi la lornon por vidi dion. Sub tiom da premo mi ree klopodis por trovi tiun lornon, ne nur ĉe la spiritismo de Alan Kardec, sed ankaŭ ĉe la teozofoj kaj aliaj antropozofoj kiaj Rudolf Steiner, Annie Besant, Blavatsky kaj pliaj Kriŝnamurtioj... Vi sendube imagas kiom da eteraĵoj, da ŝakrasoj (el "chakras", la ŝakrasoj estas la eteraj, normale nevideblaj aliaj formoj de nia homa korpo ks.) oni provis montri al mi... sed jen la problemo, por vidi, oni devas "Fidi" !*



*Kiel klarigas Ergoto, male al la simpla "Kredi" de Valo, la vorto "Fidi" entenas la tutan mistikan forton de simpla akcepto sen racia pruvo evidente. Estas ĝuste tio, kion ni la ateistoj ne povas akcepti, ĉar tio montriĝas kiel mensmanipulado, kondiĉado, mistifikado, aŭ memmistifikado, ĝuste tio estas la socia danĝero de la religioj: Fido kondukas al simpla kredo, al mistifikado. La lorno estas mistifikilo.*

*Se paroli pri mistifikado per lorno, pasintece estis tradicio, okaze de la trapaso de la ekvatoro, ke oni rigardu la linion de l'ekvatoro per lorno. La ŝipistoj adaptis maldikan fadenon ĉe la lorno, tiel ke per taŭga fokusado al la horizonto, oni efektive vidis... linion! La amuza afero estas, ke multaj homoj "fidemaj" kaj "kredemaj" akceptis la groteskaĵon kiel realaĵon. Ĉu tiel ne estas ankaŭ rilate al la vorto (nura vorto) dio?*

*Ne nur Ergoto estas bona vortĵonglisto; kaj en la citita renkonto, kiun mi ĉeestis en urbo Niteroi, tre simpatia knabino prezentis la temon "Kultura racio". La du vortoj, racio kaj kulturo, evidente stimulis mian scivolon... bedaŭrinde mi ricevis nur galimatian duŝon, kiu spontanee estingis mian eksciton, ĉar tiu "kultura racio" kuŝas en mistika mondo. Amuze estas, ke en tiu "kultura racio" ili malkovris la gravecon de la elektromagnetaj ondoj. Mi, kiel faka teknikisto, opinias same, la homoj vere tre malmulte scias uzi tiun "miraklan" formon de energio... en racia apliko.*

***La vera stulteco.***

*La grava afero en tiu dikredado aŭ ateeco, ne estas la maniero, kiel la homoj mildigas siajn psikajn traŭmatojn de absurdo, neklarigeblo ks. Por la ateistoj, kiujn mi jam citis, la danĝero kuŝas en la mistifikado, kiun la religioj alportas, sendepende de dio cetere La danĝero estas ja la "opio de la popolo", eĉ se la homoj moderne injektas al si pliajn narkotaĵojn, drogojn kiel kokainaĵojn, por ŝtopi la malplenon de siaj malfortikaj mensoj aŭ por "travivi mistikan staton", kiel diras Ergoto en **"Fajna Marketro"** paĝo 54. Estas tio, kion Lorulot prezentis en la iel naiva **"Kial mi estas ateisto"**... La pastrecaj mistifikadoj, manipuladoj de la (mi ripetas!) acefalaj popoloj. La artikolo de Edgard Jamart, "Kompatinda Irlando" paĝo 42 de L! 90 skribita antaŭ 20 jaroj validis antaŭ 1000, 6000 jaroj kaj estos same valida post 1000 jaroj, se tiam la surtera kaj homa vivo ankoraŭ ekzistos, sendepende de la dioj. Temas pri Irlando la evidente belega, inspiriga naskiĝloko de Meva Maron, kie de jardekoj fluas homa sango; la problemo estas la sama en la Persa Golfo, kie nun furiozas plia milito ne nur pro la petrolo... kaj tio estas la vera stulteco, kiun B. Aunis ne prezentis. Ĝi ja okazas sendepende de la homa ateeco (kun Stalin aŭ Ĉaŭŝescu), sed rekte ligiĝas al fermiĝo en la obskurantismo de la religioj (marksismo estas religio), en la mistika mistifikado de l' dikredado.*

*Tia stulteco estas nur nedementebla racia konstato.*

***Garolo***

************************************************************************

## PRI ATEISMO

***Responde al Aunis :***

*La naturo ne havas homajn sentojn estetikajn, ĝi ne estas bela nek malbela. Estas la homa sento, kiu decidas ke tio aŭ alio estas bela aŭ ne. Ekzemple, pejzaĝo povas esti bela, alia aspekto de la naturo estas juĝata malbela, kiel la feroca batalo, kiu okazas inter la vivaĵoj: la predantaj animaloj, kiuj voras aliajn animalojn. Laŭ mi, tiu kritiko ne estas trafa, eĉ harfendema. Inter la argumentoj de Lorulot, certe estas multaj, kiuj estas kontestindaj laŭ viaj opinioj.*

*Mi vizitis Lorulot iom post la las-*

*ta mondmilito (1946-47?) kune kun Andreo Berte. Mi povas atesti, ke Lorulot estis afabla modesta homo, kiu havis nenion komunan kun Stalin, Ĉaŭĉesku, kaj aliaj paranojuloj.*

*Religio estas ankaŭ homa sento, do genetika karaktero, ĉu ne? Iuj estas religiemaj, aliuj tute ne. Laŭ la neŭrobiologiisto Pierre Karli (1): "La kredantoj ne bezonas pruvon pri la ekzisto de Dio, ili firme deziras ke Li ekzistu, ili bezonas Lin." Mi mem dum personaj diskutoj kun katolikaj pastroj en Madagaskaro komence de la 70aj jaroj, povis konstati ke la pastroj ĝenerale ne atentas pri racieco aŭ malracieco de la argumentoj, estas tute fremda al ili.*

*Cetere, ĉu gravas ke Dio ekzistas aŭ ne? Ĉiukaze, tio ne malhelpas la teron turniĝi, ktp... Strange, ke tutpotenca Dio neniam parolas rekte al la homoj, Liaj idoj, sed nur pere de trompistoj pli-malpli fidindaj. Tiom fidindaj, ke ili kreis plurajn religiojn por unu nura Dio, kiam ne estas multaj dioj kiel en Hinduismo.*

*Por fini, mi aldonas ke la ateistoj ne estas tiom stultaj kiom povus ŝajni. La estraro de Raciista Unuiĝo konsistas preskaŭ nur el Universitataj Profesoroj, eĉ Akademianoj.*

***Pri Ergoto de Bonaero :***

*La artikoloj de Ergoto de Bonaero apartenas al metafizika galimatio, estas deliro. Povas interesi iujn, ne estas mia kazo. Liaj plej ŝatataj aŭtoroj estas Gurdiefo kaj Uspensko, ambaŭ estas mistikuloj.*

*Laŭ Imbert-Nergal (2) : "Esoterismo estas plidaŭrigata montro de la primitiva penso, kiu konserviĝis de antikvo ĝis hodiaŭ, tio konstituas hodiaŭ la pripenssistemonplej anakronisman kiu povus ekzisti."*

*Ambaŭ sistemoj : esoterismo kaj okultismo, estas sekretaj, kaj koncernas nur kelkajn homojn. Male, sciencoj estas malfermitaj al ĉiuj.*

*Estas esperende, ke Ergoto iam vekiĝu, kaj konsideru ke ni estas nun preskaŭ en la jaro 2000 p.K. kaj ne 8 000 jarojn antaŭe, kia anakronismo! La homoj kreis sciencojn kaj liberiĝis de fumaj kredoj el Neolitiko. La progresoj de la sciencoj kaj teknikoj estas egaj, de longe formalaperis la prafaraonoj, la problemoj estas tute malsamaj hodiaŭ. Simpla ekzemplo : je la epoko de J.K. estis proksimume 200-300 milionoj da loĝantoj sur la tuta tero (3), nun estas 5 miliardoj, eble 6 miliardoj en la jaro 2000. Tial oni ne plu povas diri: kresku kaj multobliĝu, nun estas plenpleno.*

***J. DEKER***


*Bibliografio :*

*(1) Menciita de Y. Galifret : **Le savant, la foi et l'Eglise,** en Raison Présente n°94, 2a trimestro 1990, p.123.*
*(2) Imbert-Nergal : **Esotérisme,** p.162 de **Dictionnaire rationaliste,** eldonoj de l' Union Rationaliste, Parizo 1964.*
*(3) Annabelle Desmond : **How Many People Have Ever Lived on Earth?** en : **The Population Crisis and the Use of World Resources.** Dr. W. Junk Publisher, The Hague, 1964, p.134.*


*****************************************************************************

## FREŜA INKO BONVENA EN LA "ĈENLETEROJ" !

Dum multe evoluis la konsisto de la abonantaro, la skipo, kiu animas la debaton per "ĉenleteroj" ne multe ŝanĝiĝis en 12 jaroj. Kvankam la red. kutime preferas lasi evolui la aferojn per si mem, hodiaŭ li sentas emon instigi al renovigo. La "laboro" estas nedeviga, nepeza (nur 3-4 leterojn jare) kaj tamen stimula por ĉiuj, verkantoj kaj legantoj.

Kun plezuro mi informos la interesatojn pri funkciado de la afero. Skribu al: la redaktejo de Laŭte.




# JES, NI BEZONAS LA LEVJATANON

## La statistika respondo

Laŭ nia moderna mondkoncepto, kun demokratio kaj la leĝo de l' plimulto, la statistikoj prezentas la dezirojn kaj la bildon de tiu propra mondo. En la debato pri Ŝtato, en L!90, kiun mi iniciatis, estis dek respondoj : du (Suzanne kaj mi) vidas la danĝeran senutilecon de la monstro. Tri restis en dubo, sed tendencas akcepti ĝin. Kvin, rekte ne sukcesas koncepti nian mondon sen iu ŝtato. Mi konfesas, ke tian rezultaton mi ne atendis flanke de laŭtuloj, kvankam ĝi perfekte enkadriĝas en la homa mistiko, same kiel pri dikredado kaj ateismo. La homoj bezonas "superajn" instituciojn ĉar ili mem, kiel individuoj, ne kapablas sin regi; regas la mito : "Kolektiveco"... La konsekvencaj diktaturoj, subpremoj, diskriminacioj, ekspluatadoj, estas nur detaletoj!... kiuj havas nenion rilatan al **obskurantismo**, la vorto, kiun mi uzis kaj kiu ofendis la sentemajn poetojn Oksana kaj Meva Maron; ĉu ne ? Estus do pli bone, ke mi kovarde forĵetu mian plumon kaj lasu vagadi la ĥimerojn el mia menso ĝis la nekoneblaj eteroj. Sed tion mi ankoraŭ ne faros.

## El la ĥimeroj

Jen ĉi tie tre konkreta grafikaĵo, kiun mi mem establis el la ekonomia realo de mia entrepreno.



Temas pri la konsisto de prezo de la varoj, kiujn mia firmao produktas. Estas facile analizi ĝin kaj vidi ĝuste, ke la ŝtato ŝtelas pli ol 50% de la valoro - ekzistas 47 specifaj impostoj en Brazilio - ... la sistemoj, kiujn la ŝtato ankaŭ establis aŭ subtenas - socialaj kostoj kaj financaj kostoj, plusvaloro, interezoj ks., atingas pliajn 30%, tiel ke por la krudmaterialo (kiu ankaŭ entenas samproporcie impostojn, interezojn, plusvalorojn ks.) kaj por la povraj laboristoj restas malpli ol 20%. Mi ne donos pliajn observojn sed petas, ke la ŝtatamantoj bonvolu longe, objektive, mediti pri tio for de sia mistiko.

Mi tamen devas aldoni, ke en nia sociordo (ordo de l' ŝtato!) kaj se konsideri la laborpovajn homojn, malpli ol 10% el la homoj agadas ĉe la tero por produkti niajn vivnecesaĵojn, 20% iel agadas en industria tereno por helpi al la produktado de vivnecesaj varoj (... kaj senutilaj varoj de konsumismo kaj de militismo!) kaj 70% el la homoj estas en la t.n. terciara sektoro t.e. la servoj, la ŝtataj, publikaj oficistoj, militistoj k.m.a. parazitoj, kiuj nenion produktas aŭ vere tre malmulte ankaŭ en manipulado de senutilaj paperaĉoj, inkluzive de mono.

Tiu stato de la aferoj eble pravigas la ŝteladon de la ŝtato por la socia justo en distribuado de la riĉaĵoj, ĉu ne? Des pli, ke la lasi-fari estas maljusta, ĉu ne? Unu fojon plian, Sovetio prezentas novan ekzemplon en tiu tereno... la perestrojko fiaskas ĉar la homoj ne volas ion iniciati... ili preferas tion lasi al la ŝtato, ĉar estas malpli penige... la paraziteco estas pli komforta, ĉu ne? Pri la konsekvenca mizero kaj reveno al gulagoj ni baldaŭ reparolos. Tamen, ĉar ni iel agadas laŭ SAT-spirito, estas vere tempo por konscii pri la direkto de nia klasbatalo, ĉu ne? Estas vere malfacile por mi, SAT-ano, "ekslaboristo", eksproleto, entreprenisto, konfesi, ke la ŝtato devigas min ekspluati la kelkajn laboristojn, kiuj laboras kun mi, por ke ni sukcesu subteni la parazitecon de l'ŝtato sub daŭra fiskkontrolado de la propra ŝtato. Sed en SAT oni ne "rajtas" tion diri, de preskaŭ tuta jarcento la klasbatalo estas alia sankta afero, ĉu ne?... Kaj laŭ la statistiko de l'plimulto: Vivu la ŝtato! Tiel estas... ĉu ne?

**Garolo**



# VIDPUNKTO de IGORJ el RUSLANDO

Traleginte en L! 90 la artikolon de Oksana (el Britio), mi deziras esprimi la kontraŭan opinion okaze de la rigardita problemo.

Nu, estimata Oksana demandas : "Kiel eta Litovio endanĝerigas la mondan pacon?" Tute simple. "La mondan pacon" (la pacon eŭropan, ĉiuokaze) determinas la rekono de la nedetruebla de la postmilitaj landlimoj, ŝtataj limoj. Nu, krom okazoj de propravola ŝtata unuiĝo, ne influanta al la limoj kun eksteraj najbaroj. Kiam landlimoj estas la objekto de debatoj, pri interŝtata trankvileco, pri paco jam ne temas. Kaj "eta Litovio", eliranta el USSR, volus nuligi por si ĉiujn sekvojn de 1939-40 jaroj, krom, tamen, tiuj, kiuj al Litovio plaĉas (Vilno-a regiono, nordbelorusiaj teritorioj, Klajpeda). Tio aperigos por la tuta regiono problemojn, kiuj ŝajnis jam, por la feliĉo, "fermitaj". Nun tio estas des pli danĝere, ke la demandoj tuŝos ĉiun komplekson de rilatoj inter unuiĝinta Germanio kaj Pollando.

Oksana skribis : "jes, mi estas por kreiĝo de multaj sendependaj ŝtatoj sur ruinoj de la Rusa imperio". Nu, unue pri la esperantlingva aspekto : kial "Rusa imperio" - ruslingve "Russkaja imperija", la imperio de rusoj? (Eĉ ja Oksana ne volas uzi la vortojn "Ruslanda imperio" - "Rossijskaja imperija", la imperio de Ruslando). Ĉu Oksana opinias, ke nur rusoj kulpas, ke USSR estis (kaj estas) nedemokratia, nekomforta, malriĉa ktp. ? Ĉu Oksana opinias, ke rusoj kreigis caran imperion kaj Sovetian imperion? Ĉu Oksana konsideras, ke je ĉiuj plagoj de Ukrainio kulpas "kacapoj" (tiel oni malrespekte nomas rusojn en Ukrainio)? Mi esperas, ke ne.

Sed - pri la deziro de Oksana okaze de "multaj sendependaj ŝtatoj" sur ruinoj de Sovetia imperio. Kiaspecaj estos tiuj multaj ŝtatoj ĉe rando de Eŭropo? Ni, sovetianoj (kaj okcidentaj historiistoj kaj politologoj) jam nun povas respondi. Tiuj ŝtatoj estos nedemokratiaj, nestabilaj landoj kun (ve!) diskriminacio de "neoriginaj" popoloj, senfinaj pretendoj de unu al alia, kun diktatoremaj gvidantoj (vidu jam nun litovian Landsbergis, kartvelian Gamsaĥurdija k.a.). Kelkaj el tiuj ŝtatoj havos fortegan armilaron (aparte, ĥemian). Povas esti, ke la atoman armilon havos ne nur Ruslando monopole... USSR (post la disfalo dezirata de Oksana) transformiĝos je tio, kio estis Eŭropo en malbonmemoraj 1930-aj jaroj. Kaj Eŭropon mem ni, verŝajne, altiros je sama farto. La disfalo de USSR revivigos ja en Eŭropo problemojn, ambiciojn, karakterajn por la "Versajla epoko". "Versajliĝado" forŝovos la 1992-an jaron de eŭropa unuiĝo.

(fino sur p.40!)

## RESPONDO AL OKSANA (Laŭte 90)

La reago al "liberaj nacioj" Irano kaj Ĉinio estas tia, kian mi esperis.

La vorto "idealismo" plu konservas por mi pozitivan sencon kiam ĝi estas uzata kun la signifo serĉi vojon al idealo, perfekteco. Ĝi negativiĝas kiam oni asertas ke oni trovis la unikan vojon atingi tiun idealon. Ĝi iĝas teruriga kiam oni trudas tiun vojon al aliuloj. Ekzemple : "amo al homaro" ĉiam havos pozitivan sencon. "Nur la katolika vojo kondukas al amo" iĝas negativa. Inkvizicio donis teruran sencon al "amo al homaro". Ĉu ĉar fiuloj donis negativan sencon al idealismo ĉiun idealismon ni forĵetu? Ĉu pro tio la homo ne plu penu por almenaŭ plibonigi la homan ekzistadon?

Idealaj socioj ne ekzistas? Eble neniam ekzistos? Eble. De tiu konstato oni elektu du sintenojn :
- aŭ blindiĝi "Ni vivas en la plejeble bona mondo". Ni estu ĝojaj kaj ni ne celu alian vivmanieron. Kio ne taŭgas ni ne diru, ni kaŝu eĉ al ni mem. Tiel ni estos feliĉaj.
- aŭ malkaŝi, denunci ĉiun malbonon, maljustaĵon ktp...kaj provi kiel eble plej korekti ilin.

"La okcidentuloj estas pli plendemaj ol la orientuloj". Ĉu tio estas riproĉo? Ĉar ili vivas en la plej demokrataj kaj riĉaj landoj, ĉu ili estu kontentaj kaj nenion pli diru? Tiel orientaj naivuloj povus kredi, ke tie travivado estas vera paradizo por ĉiuj, same kiel okcidentaj naivuloj opiniis, ke en Sovetio ne ekzistis krimeco kaj ne okazis teruraj akcidentoj.

Kontraŭ polucio kompreneble manifestacioj estas afero de proksimeco. Ankaŭ mi konsentas, ke ĉiu provu haltigi konstruadon de atomcentralo en sia propra lando. Aliparte, tre certe, ŝtatestroj surloke pli bone ol malproksima imperiestro scias pri opinioj de lokaj sciencistoj kaj loĝantaro. Sed, mi demandas min, ĝis nun en kiaj landoj, ĉu grandaj, ĉu malgrandaj, ĉu imperioj, ĉu liberaj landoj, tiuj opinioj estis priatentitaj, ekster manifestacioj? En la plej bona kazo oni zorge enketas, donas la parolon al ĉiuj, zorge notas ĉion, kaj finfine, kia ajn estas la rezulto de tiu enketo, oni decidas je la profito de granda firmao, ĉu privata, ĉu ŝtata. Kompreneble oni provas konvinki ke tio estas absolute necesa, farita por la bono de ĉiuj, ke tio solvas senlaborecon ktp... Pri polucio, ĉiu ebla agado estas bonvena, ĉu nacia, ĉu internacia.

Pri liberigaj movadoj en eksa socialisma bloko, jen mia propra reago. Kiam venis perestrojko kaj la espero pri libereco por sovetianoj mi ĝojis : "Tiuj multnombraj popoloj povos nun, ĉiuj kune, labori, cerbumi, trovi solvojn por pli bone travivadi. Profitante sian pasintan sperton kaj ankaŭ nian, ili povos starigi vivmanieron pli kontentigan por ĉiuj. Ili povos trovi solvojn por siaj problemoj kaj eble, kial ne, ankaŭ por niaj". Kaj kio okazis? Tuj leviĝis problemoj pri landlimoj, konflikto inter armenianoj kaj azerbajĝanoj, kirgizoj ktp... Anstataŭ aŭdi pri prizorgo de la problemoj, kiuj koncernas kaj kunigas ĉiujn: homrajtoj, individua libereco, sanitara organizado, ĉiutagaj praktikaj problemoj ktp., mi aŭdis pri nacioj, landlimoj, religioj, etnaj devenoj, t.e. ĉio, kio disigas la homojn. Se mia analizo estas naiva, erara, kulpas nur mia emo forigi barilojn inter homoj.

Sed ĉiun aferon oni povas rigardi plurflanke. Oksana bone klarigis sian vidpunkton en la artikolo "Kial oni bezonas propran ŝtaton". Sed aliparte ŝi opinias, ke korsikanoj estas francaj civitanoj same kiel bretonoj, vaskoj, ktp. (Ŝajnas ke la franca estraro ne opinias same, ĉar en novembro 1990 ĝi donis apartan statuton al la "korsika popolo"). En tiuj provincoj, grupoj da homoj postulas apartiĝi el Francio, paroli sian lingvon kaj prizorgi siajn proprajn aferojn. Kial Oksana ne donas al ili rajton postuli kion ŝi postulas por Ukrajno? Por mi gravas nur la individuoj, ne la ŝtatoj. Se dispecigi Francion en multajn etajn ŝtatojn donus al ĉiu homo feliĉon, liberecon, kontentigan vivpovon,... kial ne tion fari? Sed en la nuntempa politika, financa, ekonomia travivado, mi dubas ĉu tia solvo estus profitdona por ĉiuj, ĉefe por tiuj, kiuj postulas tion.

Oksana volas esti civitano de Ukraina Respubliko kaj de Eŭropa Konfederacio.
Mi havas nenian antaŭjuĝon pri nacioj aŭ ŝtatgrupoj (federacioj, konfederacioj aŭ aliaj). Mi havas nur demandojn : nacio, por kion fari? Ŝtatgrupo, por kion fari?

Mi klarigas :

- pri nacioj : ekzemple se nacio apartiĝus el grupo da demokrataj landoj por starigi aŭtoritatan aŭ fanatikan integrisman reĝimon, mi ne povos rigardi tion kiel progreson, nur regreson. Male, se popolo forfuĝas el subpremo de aŭtoritata imperio por starigi tion, kion oni nomas demokratio, tio estas progreso por tiu popolo.

- Ŝtatgrupoj povas esti ĉu demokrataj, ĉu aŭtoritataj. Pri aŭtoritataj blokoj, ne necesas longtempe paroli. Demokratioj ariĝas por atingi pli fortan ekonomian potencon. Sed kia estos la uzo de tiu potenco :

  interne : ĉu ĝi profitdonos al ĉiuj aŭ nur al kelkaj? Ĉu ĝi naskos justecon aŭ maljustecon?

  ekstere : ĉu tiu potenco estos uzata por ekonomie subpremi landojn ne aliĝantajn al tiu ŝtataro? aŭ ĉu ĝi permesos helpi malpli riĉajn regionojn de nia planedo?

Nur kiam oni povos respondi tiujn demandojn, kaj multajn aliajn, oni povos paroli pri progreso aŭ regreso.

Alia rimarko : kia estos la reciproka sinteno inter blokoj ĉu konkurantaj, ĉu antagonismaj? Inter etaj landoj okazas regionaj militoj. Kio povus okazi inter ŝtatblokoj?

Ĉu ni konkludu, ke nia terglobo devus dispeciĝi en liberigitajn vilaĝojn (almenaŭ en etajn malgrandajn teritoriojn) kunigitajn en tutmonda konfederacio?

Ĉu idealismo? Ĉar mi deziras stari sur la pozitiva flanko de idealismo, mi tuj ĉesigas tiun skribaĵon.

... Mi revenas sur teron. Ve! Kia longa vojo antaŭ ol la homaro eliros el sovaĝeco!

**Renata Meurant**

---

- la venonta numero aperos meze de majo -

---



## LAŬROJN POR LA REKORDISTO!

"Finfine!" - ekkriis mi. "Finfine atingo de esperantisto povos paradi en fama Guinness-libro!". Imagu nur: la prezidanto de Esperanta Akademio sukcesis enketi 3 MILIARDOJN da planedanoj. Kaj ili ĉiuj, en siaj babelaj lingvoj, flustris al li: "Koreo, koreano". Ĉu iu ie iam posedis tiom da lingvoj? Ĉu iu ie iam sukcesis fari tiom grandiozan enketadon? Kun plena respondeco mi diras: NENIU. Bedaŭrinde s-ro Albault ne klarigis kial li rezonis nur kun 4 miliardoj ("ni rezonu kun 4 miliardoj") kaj kial opinio de 1 miliardo (sed fakte - de du kaj pli) ne estis aŭdita.

Pro tiu kaŝemo de l'enketisto mi ne scias, kiu ne estis enketita kaj kial. Mi havas jenan rimarkon. En sia Herkulesa laborego la prezidanto iom malatente traktis malgrandan eŭropan tribon, ie en ĝangaloj inter Pollando kaj Rusio. Tiu tribo, laŭ li, nomiĝas "ukrajnanoj", ĉar ĝi ne havas sian propran teritorion kaj ĉiam estas nur "limregiono" de iu alia ŝtato, do nomadas dum jarcentoj jen el Pollando en Rusion, jen el Rusio en Pollandon, jen en amatan Siberion. La problemo estas, ke tiu tribo posedas ion, kion ili nomas lingvo (fakte, tio estas nur dialekto - sed ĉu de la pola lingvo aŭ ĉu de la rusa sciencistoj ankoraŭ ne decidis). Kaj jen tiu dialekto, kiu espereble baldaŭ formortos (ĉar, kiel diris karmemora absolute neimperiisma k-do Lanti, rusigo estas tre bona afero), havas strangan kutimon (primitiva popolo, oni estu komprenemaj): ĝi havas sufikson **-ec** por formi nacianojn (fakte, ĉiuj nacianojn ĝi formas per sufiksoj). "Ukrajnanoj* en sia dialekto diras: italijec (t.e. italo), litovec (litovo), nimec (tiel strange ili nomas germanojn), uhorec (hungaro), kitajec (ĉino) ktp. ktp. Kaj imagu - ili diras ankaŭ **korejec** (t.e. koreo, aŭ, kiel instruas s-ro Albault, koreano) - pretendante per tio, ke koreoj estas same "historia gento" kiel hungaroj, germanoj, angloj, italoj, ĉinoj ktp. Ĉar mi, malfeliĉulino, naskiĝis en tiu mistera (eble aliplaneda?) tribo de "ukrajnanoj" (jen ĝi tute ne ekzistas kaj neniu eĉ aŭdis pri ĝi, jen subite oni legas en ĵurnaloj, ke dum la dua mondmilito estis MILOJ da ukrainaj partizanoj, pardonu - banditoj, la plej sadistaj el ĉiuj

sadistoj), mi trovas tute normala, absolute senĝena, diri: koreo - Koreio. Mi demandis aliajn tribanojn (ĉar, strange, ili ŝatas lerni Esperanton) ĉu ili havas problemojn. Ili diris: NE.

Bedaŭrinde mi ne povas indiki ĝustan nombron de la tribanoj, por ke la mirakla enketisto (aŭ ĉu DIVENISTO?) subtrahu ilin de siaj 3 miliardoj. Kiel subevoluinta tribo ni ne havas propran statistikan oficejon (dum lastaj jaroj de la fama perestrojko aŭdiĝis kelkaj voĉoj en la tribo, demandante: Kial ni ne havas ĝin? Kaj kial ni ne havas tion kaj tion? Kelkaj iĝis tiom arogaj, ke eĉ kriis: **"Ni estas membro de Unuiĝintaj Nacioj! Eĉ membro-fondinto!"** - nu, vi ja tuj rekonas voĉojn de kanajlaj naciistoj. Nur ili kapablas paroli tiajn stultaĵojn!) Do pri ni okupiĝas civilizitaj internaciistoj en Moskvo. Ili ĵus (antaŭ nur du jaroj) faris enketadon en sia regno, sed ial ne publikigas rezultojn. Oni ankoraŭ kalkulas - ŝajnas ke oficistoj tie posedas nur abakojn. Do ni devas pacienci. Provizore oni diras ke tiuj tribanoj estas inter 40 kaj 50 milionoj. Bonvolu subtrahi ilin de "jese" respondinta cetero de l' enketita homaro.

Ĉu iu jam informis kompilantojn de Guinness-libro pri eksterordinara atingo de esperantisto?

**Oksana**

P.S. Kompreneble ke tion ĉi verkis emocia naciisto, kiu jam pretendis en **Laŭte!** ke ŝia tribo rajtas havi propran ŝtaton (ha! ĉu vi aŭdis ion tian?)... kaj aliajn stultaĵojn. Ĉi-foje ŝi balbutis ion pri Unuiĝintaj Nacioj. La tuta progresema homaro kaj ĝia avangardo - esperantistoj-sennaciistoj delonge scias ke tio estis nur truko de Stalin por havi tri voĉojn en UN - kaj nenio plu. Ĉiu devas koni sian lokon! Des pli - malpermesitas arogi al si rajton mem decidi pri nomo de sia patrolando!

* Bv. ne miksi kun rusoj, poloj, armenoj, judoj, krimeaj tataroj k.a., kiuj ankaŭ estas "ukrajnanoj", ĉar loĝas en Albault-a "Ukrajno".



# LETERO AL LAŬTE

*NIMES, la 1an de Februaro 1991*

*Mi ne ofte eksentas bezonon skribi al LAŬTE, kvankam mi multe ŝatas ambaŭ la eldonpresiston kaj la gazeton (Oho! ekde nun mi skribos "**gazedo**"). Sed hodiaŭ Miŝela*, kiu havas pli da tempo ol mi, ĉar mi konsentis iomete labori pri Bildvortaro (Ĉu vi konas : estas tre interesa; sed ĝi devis esti iom plinovigita ekde sia eldono), do Miŝela diras al mi: nia samideano VALO ŝajnas la piliero de Laŭte: vidu ĉi tie, kaj ankoraŭ sur tiu paĝo; kaj ŝi foliumas Laŭte preskaŭ de la komenco ĝis la fino. Finfine ŝi legis la gazedon por mi, kaj ŝi diris al mi: vidu, tio povus interesi cin: Valo respondas al iu Ergoto de Bonaero pri kelkaj vortoj, kiuj ne plaĉis al E. d B. : estas la vortoj kiuj ankaŭ al ci ne plaĉas: bireto, enketo, ktp. Ci diris al mi tion pri **komputero**, kion ci ne ŝatas, kaj ĉiam ci anstataŭigas per **komputoro**. Do kiel Miŝela mi legis la artikolon kaj tiu decidigis min skribi tion: se AKADEMIO kaj AKADEMIANOJ ekzistas, estas por elekti novajn vortojn laŭ la REGULOJ de la FUNDAMENTO: -ero, -eto, -aro havas ian signifon, do kiam oni devas krei novan vorton pri ia nova afero, kial elekti KOMPUTERO kiu ne estas parto de komputo? Ne, tute ne! la vortludoj ne permesas tiajn erarojn. Kaj oni ne permesos al ni skribi Mahomedo anstataŭ Mahometo: ekzistas ĉiam kelkaj uloj korektemaj, kiuj montrus al vi scian scion, korektante vin: ekzemple mi ne plu uzas -UJO pri la landnomoj, kvankam mi ankoraŭ legas tion de tempo al tempo. Kiu poŝtisto komprenus FRANCUJO? Eĉ, mi skribas ESPANIO, ĉar mi ĉiam pensas pri tiu poŝtisto, kiu jam devas koni multajn aĵojn: urbojn, departementojn, landojn ktp. kaj mi ne skribas GALLUJO anstataŭ FRANCIO: do kial HISPANIO? Kiam popoloj uzas latinajn literojn oni devas, **oni devigas** skribi la loknomojn preskaŭ kiel en la nacia lingvo : ĉu vi scias ke la urbo NIMES estas NIMESO laŭ PIV? Kiam vi skribos al mi, ne skribu NIMESO, mi petas, ĉar neniu poŝtisto komprenus tion...*

*Tiaj linioj, ĉar mi tute ne estas kontenta de mia regiona prezidanto, kiu korektis mian ESPANIO, anstataŭskribante HISPANIO!*

*Do, al mil diabloj la vortludemuloj! Kiam ni skribas serioze, nia lingvo devas permesi esti komprenita, kaj tiu lingvo estas nia ĉiutaga afero; kiam ni vortludas, ofte oni devas antaŭklarigi la aferon, kaj tamen la aŭdantoj ne ĉiam komprenos.*

*Tamen dankojn al nia ĉiamverda samideano Valo, kiun mi multe ŝatas, sed mi insiste petas por pli da seriozeco ĉe niaj tre respektindaj Akademianoj. Diskutadi pri ata kaj ita ne estas serioza vortludo!*

*PAŬLO*

** Miŝela ne ŝatas tian skribaĵon de sia nomo, preferante "Miŝele", sed ŝi ne estas adverbo!*

****************************************************************

## VIDPUNKTO de IGORJ el RUSLANDO

(fino de p.33)

Kaj kiel, kiamaniere USSR disfalados kaj "multaj sendependaj ŝtatoj" aperados? Ankaŭ tio estas (por ni, sovetianoj) tutklare. "Sendependaj ŝtatoj" naskiĝos per "fero kaj sango", per multnombraj eventoj, similaj al eventoj en Karalaĥ kaj Vilnius. Jes, certe, kulpa pri tio estos, verŝajne, KPSU, Gorbaĉov, "imperiistoj" (tamen ne nur ili) sed ĉu estas grave kiuj estos kulpaj? Grave, ke homoj falos kiel viktimoj de la ideo de "propra ŝtato". Ĉu "multaj sendependaj ŝtatoj" estas tiel valoraj, ke vi, Oksana, ne volas ŝpari vivajn homojn? Ĉu denove "for de kompromisoj"? Ĉu denove la ideo (eĉ la plej bona) estas super Homo? Koran dankon, niaj avoj tion jam lernadis - en 1917-a jaro. Kaj plimulto da sovetianoj (kaj rusoj, kaj ukrainoj, kaj ĉiuj) ne deziras novan revolucion (ajn socian, ajn nacian). Tro multe da sango revolucioj en nia lando ĉiam bezonas.

Pro tio ĉio mi kontraŭas la odon de Oksana al "propra nacia ŝtato".

La redaktanto dankas pro tiu ĉi unua vidpunkto venanta el la vasta Sovetio, kie ĝis nun "Laŭte" havis preskaŭ neniun leganton. Bonvenon!



O.P. :

# LA DISDONA EKONOMIO LA EKONOMIAJ DOKTRINOJ KIEL PROGRESADI?

(daŭrigo)

Mi jam parolis pri mono, dispartigo de la enspezo, labor-organizado, inspirite de la ekonomikaj verkistoj. El tiuj diversaj fontoj mi diris mian propran opinion, laŭ kiu maniero oni povos solvi la nunajn problemojn.

Nun oni parolas pri ebla solvo per la liberalismo : malpli da ŝtata interveno, pli da individua, liberala iniciato. Fakte, en la unua tempo de la kapitalismo la liberalismo estis faktoro de disvolviĝo. La psikologiaj fundamentoj estis : propra intereso, hedona principo (kiu motivigas la homon ricevi kiom eble plej da kontentigo per kiom eble malplej da peno) (Adam Smith), apartigo de la laboroj, preza mekanismo, kiu adaptas la oferton al la mendo. La merkata leĝo instigas al produktado de nesufiĉaj varoj, al produktado per ĉiam malpli da kostoj. El tio rezultis pli bona kontentiĝo de la homaj bezonoj. Ĉu per tiu organizado oni povus solvi la nunajn problemojn?

Tiu liberalismo permesis disvolvon de la produkta kapitalismo, ĝi taŭgis kiam ĝi ebligis ampleksigi la merkaton, kiam la produktado ne sufiĉis, aŭ almenaŭ kiam ekzistis deziro kaj ebleco de la homoj havigi al si pli da kontentigoj. Nun ne samas la problemo kaj la produktebleco estas pli granda ol la konsumbezono, almenaŭ en la industriaj landoj. Do, ne temas disvolvi la produktadon, sed ĝin organizi tiel ke ĝi produktu laŭ racia uzado de ĉiuj teknikaj, sciencaj, profesiaj scioj, ŝparante la homan penon, kaj en bonaj laborkondiĉoj, ne poluante la naturon, ŝparante la elĉerpeblajn riĉofontojn, dispartigante la plenumendajn taskojn inter ĉiuj disponeblaj laboristoj, bone kontentigante ĉiujn bezonojn. Por tio necesas ekonomia

planado, organizada kunordigo, kunlaborado anstataŭ la merkata konkurenco. Por tio estos teknikistoj, kiuj proponos kaj post konsento de la popolaj instancoj, plenumos la gvidan funkcion.

RIKARDO, la unua, diris, ke la valoro de varo estas determinata de la produkta kosto. Li diris ankaŭ pri la teorio de la komparaj kostoj. (Estas intereso de ĉiu lando specialiĝi en la produktado, por kiu ĝi estas plej naturdotita). Aliaj liberaluloj reliefigis la grandan rolon de la entreprenistoj.

John Stuart MILL (1806-1870) diris, ke "la privata proprumo estas nur socia institucio kaj ne natura rajto. Oni rajtas leĝe ĝin modifi. Interalie la hereda rajto devus esti limigita, ĉar ĝi rezultigas malegalecon en la porviva batalo." Li vidis kian maljuston naskas tiu senlima propruma rajto. La Franca Revolucio deklaris en la homaj rajtoj (art.17) : "Ĉar la proprumo estas neperfortebla kaj sankta rajto, oni povas senposedigi neniun, nur se la publika neceso, leĝe konstatita, evidente neprigas ĝin kaj kondiĉe de justa antaŭa monkompenso." Same, la universala Deklaro de Homaj Rajtoj: "Ĉiu rajtas posedi havaĵon, aŭ sola aŭ en asociiĝo kun aliaj. Al neniu estu arbitre forprenita lia proprieto."

Laŭ mi, necesas difini kiuj estus la individuaj aŭ etkolektivaj proprietaj rajtoj. La individuaj rajtoj estus sen limo por ĉiuj individuaj bezonoj. La individua aktivanto posedus siajn bezonatajn bienojn kaj ilaron, sed ĉiuj necesaj grandaj rimedoj por la kolektiva vivo fariĝos proprumo de la socio, ĉu de komunumo, departemento, regiono, nacio, federacio, laŭ ties grandeco. La heredantoj (geedzoj, gefiloj, gepatroj, geavoj, genepoj) rajtus nur la bezonaĵojn. Por tiuj, kiuj daŭrigos aktivadon de la entrepreno estus favoraj kondiĉoj. Ĉiuj aliaj proprietoj fariĝus sociaj proprietoj.

Reage al liberalismo aperis la ekonomiaj naciismoj. Temis pri protektado de la nacia ekonomio (malfruiĝintaj industrioj, teknikoj, produktado kaj plena dungado). Mi opinias, ke sen retroiri al fermita ekonomio, estontece oni devos kiel eble plej kontentigi la vivbezonojn, uzante unue la lokajn riĉofontojn kaj disponeblajn aktivulojn. Ĉar eĉ en la kamparoj malplej fruktodonaj estas interese, ke plu vivu kiel eble plej da loĝantoj por bone prizorgi la agrokulturan laboron.



SISMONDI (1773-1842) diris : "Oni ne devas konsideri produktadon kiel nuran celon." Li estis la iniciatinto de la intervenismo. Li diris ankaŭ : "La konsumo de laboreja estro, milionulo, laboriganta sub sia mastrumado mil laboristojn ricevantajn striktajn necesaĵojn, ne valoras por la nacio tiun de cent fabrikantoj malpli riĉaj, kiuj laborigas po dek laboristojn malpli mizerajn. La akumulado unuflanke, la malplia konsumo aliaflanke, okazigas krizojn.

K. MARKS deklaris:"SISMONDI estras la etburĝan socialismon." Sekvis diversaj doktrinoj: solidarismo, kristana socialismo, radikalismo kaj socialismo. Unue, la idealista utopia socialismo (Fourier, Proudhon, ktp), due la scienca socialismo (K. Marks), trie, diversaj postmarksaj teoriuloj.

PROUDHON rekomendis mutualismon. Li estis ĉefa instiganto de la liberema socialismo. Unue li estis kontraŭ la privata proprieto ("La proprieto estas ŝtelaĵo"), sed poste li ĝin akceptis. Li celis malaperigi la socialajn malegalojn, forĵetante la enspezojn akiritajn sen laboro, per apliko de la mutualista principo al la disdonado de la kredito : la fama teorio de la senpaga kredito. Interŝanĝa banko donus al produktantoj valorpaperojn garantiataj per produktitaj varoj. Ĝi donus kreditojn sen intereso al ĉiuj, kiuj ilin bezonus, por aĉeti produktilojn. La valoro de tiuj biletoj estos garantiata per ĉies reciproka interkonsento. Tiel oni povus malaperigi maljustecon, certigi la liberan disvolviĝon de la homa personeco, ne tuŝante la privatan proprieton, kiu estas la plej bona protekto de la individuo kontraŭ la Ŝtato.

En tiu propono estas bonaj ideoj, sed kia estus la valoro de bileta unuo rilate al malsimilaj produktitaj varoj ? Aŭ ĉu estus nur kvazaŭa salajro ? Tiele nur la produktantoj havus enspezojn, do ili povus disponi ilin laŭ sia plaĉo, kaj ĉiuj aliaj sociaj kategorioj dependus de ilia bonvolo.

Krome, kiu decidus en banko doni krediton al tiuj, kiuj volus entrepreni, akiri produktilojn? Tio ĉi ŝajnas neefektivigebla. Tamen oni povas diri, ke la ideo, ke la laboro estas la fonto de ĉiuj disponeblaj riĉaĵoj, estas ĝusta; ankaŭ la ideo, ke valoro de monbiletoj estas afero de reciproka fido, reciproka interkonsento.

La anarkiismaj teorioj baziĝas laŭ iom similaj principoj. Ne plu estos laboristoj interŝanĝantaj produktaĵojn je la produkto-kosto... neniel necesos registaro, ŝtato... ekzistos nur egaluloj... ne plu estos konfliktoj. "La mondo fariĝos federacio el liberaj asocioj... malkatenitaj el la kapitalismo... la natura homa boneco sufiĉos por certigi bonan funkciadon de la socialismo" laŭ SOREL.

"MARKS kaj ENGELS komprenis, ke la kapitalisma sistemo, baziĝanta sur la vetkuro al individua profito, estis malkapabla certigi harmonian disvolvadon de la socio, ke ĝiaj kontraŭdiroj kondamnas ĝin malaperi iun tagon. Ili konsideris la proletojn de la grandaj urboj la nura socia klaso, kiu, elperfortante ekonomian kaj socialan povon el la burĝaro, povus naskigi novan socion. Tiel, por MARKS kaj ENGELS la socialismo ne plu estis nura bona deziro, eliĝanta el aspiro al justo, ĝi fariĝis ebleco malfermita per la disvolviĝo de la kapitalisma sistemo mem. Jen kial ili nomis ĝin "scienca socialismo" kompare kun utopiaj revoj." (Arlette LAGUILLIER: **Necesas la mondon ŝanĝi**).

Ni vidas, ke K. Marks kaj Engels laŭ sia studado pri kiel evoluos la socio, laŭ sia analizo pri kiel funkcias kaj evoluos la kapitalismo, konkludis pri ebleco de verŝajna evoluo al socialisma sistemo. Ili volis demonstri, ke tio estas science pravigebla. Tamen oni devas konsideri la homan volon, deziron, kiu ankaŭ evoluas. Ilia sinteno eble estis tro optimista, tro fidis al evoluo de la laboristaro, al ĝia kapablo starigi novan ekonomian ordon. Tiel oni povis paroli pri dezirinda socialismo, sed ne pri science pruvita evoluo ĝis socialismo. Eble oni tro facile konkludis pri fatala socialisma sukceso.



La Marksa politika ekonomio eliĝas el la verkoj de la britaj ekonomikistoj kaj el la francaj socialistoj. Jam RIKARDO determinis la salajron kiel la valoron de la vivrimedoj necesaj al laboristo kaj lia familio, tio estas en realo, laŭ la kosto de la reproduktado de la laborforto. "La natura prezo de la laboro estas tiu, kiu provizas al laboristo la rimedojn necesajn por daŭrigadi kaj eternigi sian kategorion sen pliiĝo kaj sen malpliiĝo." RIKARDO. Li difinis la profiton kiel valoron plusan al tiu de la salajroj ; la renton, kiel pluson al salajro kaj profito.

La unua kritiko de MARKS estis por determini kio estas la valoro laŭ Rikardo. Jam Benjameno FRANKLIN asertis, ke necesas serĉi alian mezurilon ol la altvalorajn metalojn: ĝi estas la laboro. "Ĉar la komerco, skribis FRANKLIN, estas ĝenerale ne alia afero ol interŝanĝo de laboro kontraŭ laboro, la vera valoro estas plej ĝuste taksata per la laboro."

Kaj Adam SMITH : "La laboro estas la reala mezurilo de la interŝanĝa valoro de ĉiuj varoj, kaj ankaŭ : "La objektoj entenas valoron de iu kvanto da laboro, kiun oni interŝanĝas kontraŭ tio, kio oniatakse entenas valoron de sama laboro." Kaj RIKARDO nete determinis la varan valoron laŭ la labortempo. MARKS : "La laboro, tia kia ĝi montriĝas en la interŝanĝa valoro, estas la homa ĝenerala laboro". La grandeco de la diferencoj inter la varoj konsistas el la grandeco de la diferencoj inter la laboro efektivigita por ilin produkti, kaj tiu grandeco esprimiĝas per la tempo. La tempo estas la kvanta esprimo de la laboro. Same kiel interŝanĝaj valoroj, ĉiuj varoj estas nun mezuriloj de kvanto da labortempo enkorpigita en ili.

Teorio pri la mono : Ideala formo, laŭ kiu la varoj montriĝas unu rilate al alia kiel interŝanĝa valoro, ekvivalento ĝenerala de la multobligo de la varaj interŝanĝoj, ĝi fariĝas deirpunkto de la kapitalo.

Akumulite de izolaj grupoj, aŭ de iuj ajn popolaj kategorioj, la mono je iu stadio de disvolviĝo de la merkata produktado - kiam la produktistoj ne posedas siajn produktaĵojn - aliiĝas en kapitalon. La rolo de la mono ne estas alia afero ol la rolo de la valoro, kiu akiras sendependan formon. Kiel mezurilo de valoroj, la oro uti-

las por ŝanĝi la varajn valorojn en imagitan oro-kvanton, en prezon. La prezo informas pri la kvanto da valoro de la varoj, t.e. pri la intima rilato ekzistanta inter iu varo kaj la labortempo necesa por ĝin produkti. "La sociale necesa tempo por produkti iun varon estas tiu trudita de ĉiu laboro efektivigita per meza lerteco kaj intenso, kaj en kondiĉoj, kiuj estas normalaj rilate al donita socia medio, kaj samtempe la interŝanĝa rilato de la varo kontraŭ mono." La papera mono anstataŭas nur la metalan monon por la funkcio de cirkulada instrumento.

La riĉo naskiĝas el la produktado. La mono faciligas cirkuladon kaj permesas akumuladon. Kiel okazas tiu akumulado? por kies profito? Tion MARKS klarigas per la teorio de la plusvaloro: La valoro produktita de unu laboristo superas la valoron necesan por certigi lian vivtenon kaj pluigi lian laboran staton. La kapitalisto aĉetas lian laborforton (totalan) sed alpropriĝas al si kion li produktas. Tiu produktitaĵo valoras pli ol kion oni pagis al la laboristo, la kromaĵo konsistigas la plusvaloron, la profiton de la kapitalista entreprenisto. Ĝia ekzisto estas esenco de la kapitalista reĝimo sed samtempe kondukas ĝin al nesolvebla situacio.

Oni povas konkludi, ke fakte la homoj produktas kolektive por kontentigi siajn bezonojn sed poste tiuj produktaĵoj estas tute malegale dispartigataj. Tiuj, kiuj jam posedas, alpropriĝas al si grandan parton, eĉ ne partoprenante al la laboro, dum la produktistoj ricevas nur por sia vivteno. La ŝparita kapitalo riĉigas la riĉulojn; ili disponas de tiu nova kapitalo laŭ sia plaĉo kaj uzas ĝin por akiri novajn profitojn!

**Leĝo de la kreskanta akumulado de la kapitaloj**
La kapitalisto konsumas parton de la plus-valoro, sed li ŝpare akumulas la plej grandan parton, kiu pliigos lian kapitalon, permesante disvolvi lian entreprenon aŭ malfermi novajn.

**Leĝo de la kapitalista centrigado**
La krizoj okazigas bankroton de la sendependaj produktantoj, metiistoj, etkomercistoj, kiuj ne kapablas rezisti



al la rapida malplialtiĝo de la prezoj. La potencaj grupoj akiras iliajn entreprenojn kaj tiuj sendependaj homoj fariĝas iliaj salajratoj. Estas la duobla fenomeno de proletigo de la mezklasanoj kaj starigo de ĉiam pli ampleksaj entreprenoj (trustoj, konzernoj ktp.)

**Leĝo de la aŭtomata malproprigo**
Tiu disvolviĝo plejofte okazas laŭ formo de anonimaj societoj, kies akci-posedantoj ricevas profitojn ne partoprenante en la mastrumado... Kiam ĉiuj gravaj entreprenoj tiel estos organizitaj, ili estos maturaj por malproprigado. Simpla skriba ago permesos transdoni al nacio (socio) ĉiujn valorpaperojn enskribitajn je la konto de la akciuloj. Finiĝos la privata proprumo de la produktigaj rimedoj, ili fariĝos kolektiva posedaĵo. MARKS opiniis tiun evoluon neevitebla. Ĉu li vere diris jenon? "La labora produktaĵo de ĉiuj estos dispartigita laŭ la laboro plenumita de ĉiu. El tio rezultos samtempe malapero de ĉia ekspluatado kaj de ĉia krizo superprodukta. Ĉiu laboristo ricevos ĝustan parton imputitan pro lia aktivado, sen maljusta antaŭa elpreno de plusvaloro aŭ profito. Ĉiu havos eblecon aĉeti ekvivalenton de sia propra produktado; tiel malaperos la ekonomiaj krizoj: la ekvilibro inter produktado kaj konsumado estas certigata." (el **Les doctrines économiques** - La ekonomikaj doktrinoj - Que-sais-je? - eldono)

Laŭ mi, la socialismo ne povas pretendi similan celon. Temas nur pri kolektiva produkta laboro, sed poste la dispartigado de la produktaĵoj okazos nur post elpreno de la parto necesa por ĉiuj kolektivaj bezonoj, por ĉiuj sociaj membroj, se ne en tute egalaj porcioj, tamen sen tro grandaj diferencoj, tiom por la aktivuloj en servoj aŭ nekapabluloj, kiom por tiuj, kiuj laboras en produktado de varoj aŭ energio. Ĉu eble grave eraris la socialistoj, se ili kredis la marksan difinon? Mi opinias ĝin ne atingebla, nepraktika kaj tion oni devas klare diri.

Post MARKS estis pluraj marksistaj skoloj. La marksismo influis la revolucian sindikatismon samtempe kiel la anarki-sindikatismon. Oni citas LENIN kiel ĉefan daŭriganton de MARKS, sed li verkis ne nur pri ekonomio, ankaŭ pri propra politika organizado kaj agado.

Kelkaj ekonomikistoj ne same vidis la manieron taksi la valoron. Tiel ili difinis la varan valoron laŭ la utileco, ne laŭ la kosto de la produktado. Tio estas tute malsama pozicio, oni staras flanke de la konsumantoj anstataŭ flanke de la produktantoj. Laŭ mi, ne plu temas pri valoro, kiun MARKS bone difinis (objektiva valoro). Oni konfuzas malsamajn aferojn. Se temas akiri necesaĵojn pli-malpli utilajn, eĉ nemalhaveblajn, kiuj ne abundas, tiam oni vole donas des pli ol iliajn interŝanĝajn valorojn ju pli oni disponas aĉetpovon. Tio signifas, ke oni pagas pli ol ĝian valoron, kiu ne ŝanĝiĝas. Se oni disponas multajn valorojn, oni povas aĉeti ankaŭ aĵojn, artaĵojn, ornamaĵojn, juvelojn, luksaĵojn, superfluaĵojn ne utilajn, sed kiujn oni deziras, pagante pli ol iliajn interŝanĝajn valorojn, sed tio ne rilatas kun iliaj interŝanĝaj valoroj. Tiel la merkata leĝo (ofertado, postulado) ludas por la prezoj ne nur por interŝanĝi necesajn varojn sed ankaŭ laŭ grado de utileco, plaĉo kaj abundo. Sed oni produktas kaj interŝanĝas ĉefe la necesaĵojn por la vivo, kaj ĝustaj-justaj prezoj estas kiam ili konsistas el ekvivalento de interŝanĝaj valoroj. Male, kiam oni postulas servon, oni donas valoron kontraŭ tiu servo. Kiamaniere taksi la valoron de tiu servo? Ĉu oni ne povas uzi la difinon de RIKARDO por la salajro? "La natura prezo de la laboro estas tiu, kiu provizas al laboristo la rimedojn necesajn por daŭrigadi kaj eternigi lian kategorion sen pliigo kaj sen malpliigo." Ĝi rilatas al vivteno de la servodonanto sed al tiu strikta difino oni povas aldoni: Ĝi rilatas al grado de bezono, kvalito de tiu servo, kaj dependas de kiom oni disponas por ĝin pagi.

El la libro **La ekonomikaj doktrinoj** : "Ĉu tamen ne eblas, konsiderante la homajn malperfektaĵojn, koncepti pli bonan reĝimon certigantan pli bonan ekvilibron inter la kolektiva intereso en ĝia tuto kaj tiu de ĝiaj unuopaj membroj, reĝimon certigantan pli harmonian disvolviĝon de la homaj personoj konsistigantaj la socian tuton?"

Kun tiu konkludo mi tute akordiĝas, sed ĝi ne donas solvon por tion atingi. Ĉu socialismo? Jes! Sed kiu ordigos ekonomion por ĉies profito, kiu estus kiel eble malplej trudema, lasante grandan liberon, iniciaton al individuoj, etaj kolektivoj? Ĉu la disdona ekonomio de DUBOIN?

(daŭrigota)



Esperanto kaj ekologio

# LOKA REALIGO DE LA INTERNACIA LINGVO

**(Pri neinvadema koncepto ĝui kaj disvastigi Esperanton laŭ la devizo "Pensi globe, agi loke".)**

---

Sen trinkebla akvo, spirebla aero, fekunda tero kaj konforma klimato Homo sapiens alpaŝos ekstermiĝon samkiel Brontosaŭro kelkmilionojn da jaroj antaŭe (1). La teknologia civilizacio adaptiĝos al la bezonoj de la travivo nur, se ĝi samgrade plenumos la postulojn de universala paco, sociala justeco, ekonomia efikeco, ekologia adekvateco kaj kontrola demokratio. Nuntempe la homaro ŝajnas survoje al paco kaj justeco, sed je la kosto de la vivmedio (2, 3 ,4). Ankoraŭ estas la homo, kiu ĉefrolas, kaj ne la vivo (5, 6, 7). La hom(ar)o ĝismorte ĝuas la biosferon (8,9,10). Kaj laŭ la lastaj disvolviĝoj estas la antropocentraj konceptoj pri Homaj Rajtoj, Demokratio (5), Teknologio kaj Merkatekonomio, kiuj respondecas pri la mizera kaj minacata stato de nia Planedo. Ĉiukaze ne tolereblas la elspezoj por la nunkondiĉa moderna mondo (2). La homaro vivas memmortige en debeto.

Ekologia kaj sociala justecoj porlongtempe estableblas nur je jenaj bazaj kondiĉoj:

1. Generala malkonstruado de la militaparato.
   - = Malarmado en la Unua, Dua kaj Tria Mondoj (11, 12).

2. Memlimigo koncerne la propran vivonivelon.
   - = Reẑigno pri ties ekscesoj.
   - Neniel pravigebla estas la fakto, ke 30 % de la mondloĝantaro konsumas 70 % de la Planedaj resursoj. La mentaleco de "neniu limo" aŭ de "pli multe da ĉio" endas esti anstataŭigata de filozofio pri "ne pli ol necesas" kaj konceptoj pri la manaĝado de malabundo. Oni neniam forgesu: Riĉaĵoj tenataj estas riĉaĵoj retenataj. La riĉuloj devas vivi pli simple por ke la malriĉuloj simple vivu. Kaj lastinstance la subjungigo de la homo estas en ĉiuj politikaj sistemoj la kaŭzo de la naturdetruo (2, 13, 14, 15, 16, 17, 18, 19).

3. Preventiva karaktero de la vivaj sistemoj (20).
   - La preventiva karaktero de la homa socio evidentiĝas el la obeado de la t.n. biokibernetikaj reguloj en vivaj sistemoj (21): 1. Domino de negativaj retrokupladoj super pozitivaj. 2. Sendependeco je kresko. 3. Funkciorientiĝo. 4. Utiligo de ekzistantaj fortoj. 5. Plurfoja utiligo de produktoj, funkcioj kaj strukturoj. 6. Reciklado. 7. Simbiozo. 8. Biologia desegno.

4. Tramonda distribua justeco.
   - Nuligo de sensencaj troproduktadoj, koruptoj kaj politikaj-ideologiaj bariloj. Konsekvenca senŝuldigo de la Tria Mondo kontraŭ ekologia politiko (2, 16, 4).

Esperanto. En tiu oni alkalkulas ĝin simile kiel la scienca lingvo al la vivofremdaj tendencoj al generaremo en nia epoko (36). Tiu devigo al evito de laŭeble ĉiu eraro baziĝas en kaj kondukas al grandaj kaj kompleksaj teknikaj kaj sociaj strukturoj, kiuj preskaŭ neeviteble estas ligataj kun detruaj intervenoj en la vivoreton de nia Planedo (ekzemploj estas la milita maŝinaro, naftotransportoj, informosistemoj ktp.). Oni estas rememorigata pri la eldiraĵo de la aŭstria filozofo L. Kohr: "Kie ajn io malĝustas, ĝi troe grandas!" (13).

Ekologie laŭracia estas la neinvadema koncepto de "universala loka realigo" de la Internacia Lingvo kiel la lingvo de unu homaro laŭ la malnova devizo "Ĉiu scipovu minimume du lingvojn, sian propran kaj Esperanton!" Tiu koncepto estas neinvadema ne nur pro tio, ĉar Esperanto el si mem laŭ la biokibernetikaj reguloj (21) povas esti nomata "ekologie taŭga" (diference al la plej multaj etnaj lingvoj). Sed ankaŭ pro tio neinvadema, ĉar ĝi principe kaj unuarange ne subtenas eksteren kaj traglobe direktatan aplikon grandskalan. Ĝi komprenas sian disvastigon kiel necesan kaj je la necesa minimumo orientatan konsekvencon de ĉie en la mondo loke aŭ regione realigata scipovo pri si. Se ĝustas, ke la Internacia Lingvo povas esti ĉiuloke lernebla kaj komprenebla kompetenta mondlingvo de unu homaro, kompreneble ankaŭ eblas, ke ĉiu civitano de tiu ĉi mondo, kiu iuloke eklernis Esperanton, en simpla maniero povas kompetente interkomuniki kun ĉiu alia parto, t.e. kun ĉiu alia civitano de la mondo, kiu siaflanke sialoke eklernis tiun lingvon. Principe ja nur necesas la scipovo de tiu nediskriminacia neŭtrala lingvo kaj la ĉiukaze jam ekzistanta mondvasta komunikada substrukturo. Dekomence ne estiĝus neceseco kaj ebleco de iu pli pretendema lingvo- aŭ komunikad-industrio, kiu devige konsumas pli da vivobazoj kaj agadas pli agresema en la senco de turisma kaj kulturekonomia ekspansio. Per la ĉie en la mondo rekruteblaj lokaj kompetentoj de tiu Internacia Lingvo oni facile povus solvi ĉiujn interkompreniĝajn problemojn de pli altaj niveloj. Dekomence evitiĝus malbonefikoj de konkurenco inter la etnaj kaj la Internacia Lingvo. Kaj sensenciĝus kostoj de investemaj, vivo- kaj kultur-detruaj konkurenco inter la etnaj lingvoj pri prioritato en la mondo. Tiatipa neperforta kaj neagresema internacia komunikomodelo liveras praktikan ekzemplon pri la principo "Pensi globe, agi loke." Ĝi konformas al la ekologia transformado de la industrisocio(j) samkiel al la ekologia konstruo de la triamondaj socioj per adaptitaj kaj "teneraj" teknologioj. Tie-ĉi troviĝas unu de la fareblaj utopioj!

Du aspektoj el la sfero de la Esperanto-Movado relativigas per intelekte kaj ekologie tre sana maniero la signifon de la Internacia Lingvo, transe de ĉiu stulta lingvointerbatalo kaj ĉiu embarasa lingvodiskriminacio. En la Manifesto de Raŭmo, Finlando, 1980 (37), estis prezentata la koncepto de internacia kulturo surbaze de la Internacia Lingvo. Esperanto sin komprenas kiel la sumo de ĉiuj diaspore, t.e. dise loke aŭ regione, laborantaj Esperanto-minoritatoj. Kaj La Ekologia Centro Internacia kun Esperanto kiel oficiala lingvo, Mondhejmo (38), en Sudfrancio apud Béziers, realigas antaŭ tiu ĉi spirita formo la praktikan transformadon de internacieco en antaŭdonita ekologia kadro. Oni povus diri, ke la Manifesto de Raŭmo estas la esperanta softvaro de la hardvaro Mondhejmo. Simile al tiaj projektoj kaj modeloj povus esti akcelata tre malmultekoste la enkonduko de la Internacia Lingvo flanke de unuopaj popoloj kaj nacioj (35).



Skizo.
Esperanto kaj ekologio.

**LOKA REALIGO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO**
**(Pri neinvadema koncepto ĝui kaj disvastigi Esperanton laŭ la devizo "Pensi globe, agi loke".)**

---

**1.**
**Ne plu akcepteblas kulturo, kiu detruas naturon. Ekologia transformado de la teknologi- industria civilizo signifas pacon inter naturo kaj kulturo (5, 43).**

**2.**
**Esperanto estas praekologiaĵo (7, 21).**

**3.**
**Esperanto estas "neŭtrale homa lingvo" (39), "lingvo de unu homaro" (40) kaj "dua lingvo por ĉiu" (29). Ĝi estas simpla, logike regula (41, 42) kaj kompetente funkcipova ĉiunivele (29).**

**4.**
**La bazaj ekologiaj kondiĉoj koncerne Esperanton (ILo) estas:**
- **Esperanto servu la vivon, ne sole la homon, ĝi apogu sin bonkonscience sur la tero (5, 13, 14).**
- **Esperanto kiel helpilo al biosfera kolapso: Ne dankon!**
- **La respondeco pri internacia lingvo NE estas afero de lingvistoj aŭ lingvuloj, sed de la tuta hom(ar)o: Esperanto estas biologia, sociala kaj lingva fenomeno (6). Ĝi estas afero de interdisciplineco kaj ne de "faka idioteco".**

**5.**
**Ĝuo kaj disvastigo de la Internacia Lingvo (ILo) ne estas internacia afero en la senco de mone kaj materiale subtenata konkurenco kun aliaj etnaj lingvoj (37).**

**6.**
**La baza regulo malantaŭ la ekologia apliko de ILo estas: "Internaciismo estas detrua por la biosfero, escepte, se oni povas sukcese pruvi la malon." (11)**

**7.**
**La "universala loka realigo" de ILo devenas de la centra fakto, ke Esperanto pro sia genia strukturo estas ĝiskompetente lernebla**
- **per ĉ. nur 1/5 ĝis 1/10 de la materiala kaj intelekta investo (44, prof. Franck - Paderborn),**
- **principe sen kontaktoj al alietnuloj, kaj**
- **kiel esprima-komunika metodo, kiu kombinas rigoron al precizeco kun la libereco al kreivo (45).**

**8.**
**La "universala loka realigo" de ILo estas por la biosfero neagresiva kaj resursoŝparema "metodo". Ĝi sekvas la principon de minimuma disipo je maksimuma rezulto. La unuaranga celo de simpla kaj kompetenta komunikado tutmonda atingeblas per konsekvenca kreado de lokaj Esperantaj kompetentoj. Kiu en sia loko lernis Esperanton povas laŭbezone kaj per la ekzistanta substrukturo interkontakti, interkomuniki kaj interkompreniĝi kun ĉiu aliulo, kiu siaflanke en sia loko lernis Esperanton.**

9.
Ĉiu oficiala Esperanto-organizaĵo havu, precipe pro sia internacieco, enstatuigitan ekologian kontrolinstancon de la propra laboro (45).

10.
La (post)moderna formulo de la interna ideo tekstas: "Interkomuniku pace, frate kaj garde!" (34, 46)

W. Günther
Schulstr. 7
D-W- 3501 AHNATAL 1

1990-12-15 (Z!)

LITERATURO

1. Birch, C. - Creation, Technology and Human Survival: Called to Replenish the Earth - Ecumenical Review, Vol. XXVIII, No. 1, 1976

2. Birch, C. u.a. - The Predicament of the Prosperous - The Westminster Press, 1978

3. Corson, W. - The Global Ecology Handbook - Beacon Press, 1990

4. Latin Quarter - Nothing Like Velvet - BMG Ariola

5. Gunde, E. - Naturo kaj Socio - Esperanto-Centro Paderborn, 1985

6. Eurich, C. - Die Megamaschine - Vom Sturm der Technik auf das Leben und Möglichkeiten des Widerstandes - Luchterhand, 1988

7. GEA - Antaŭ la nova jarmilo - Esperanto-Centro Paderborn, 1987

8. Mayer-Tasch, P. - Die verseuchte Landkarte - Beck'sche Reihe 329, 1983

9. Scientific American (Spektrum der Wissenschaften) - Sonderheft 9, 1989

10. Worldwatch Institute Report - Zur Lage der Welt 90/91 - Fischer, 1990

11. Reader zum 1. Internationalismus-Kongress der Grünen, Kassel, 1985

12. Schierholz, H. - Frieden, Abrüstung, Sicherheit - Rowohlt 1981

13. Means, R. - Indianische Naturphilosophie - El: Viele Wege, Trikont - Metapolitik, 1985

14. natur - Das Umweltmagazin: Mohawk, J. - Botschaft an die Europäer, 8/85

15. Daly, H. - Economics, Ecology, Ethics - Freeman, 1973

16. ÖDP - Parteiprogramm 1990

17. DIE GRÜNEN - Parteiprogramm 1990

18. Jonas, H. - Technik, Medizin und Ethik. Zur Praxis des Prinzips Verantwortung . - Insel, 1985

19. Galtung, J. - Neue Werte für Wirtschaft und Politik - in: s. (vd.) n-ro 13

20. Günther, W. - Preventivo - Ĉu ekkologia kvintesenco de la vivomondo? - Tours, 1990 (ĉe la aŭtoro)



21. Vester, F. - Ballungsgebiete in der Krise, dtv 10080, 1983

22. Dossey, L. - Die Medizin von Raum und Zeit - Rowohlt 8327, 1982

23. Albery, N. k.a. - How to Save the World - Turnstone, 1984

24. Lutz, R. - Pläne für eine menschliche Zukunft - Psychologie heute, Beltz, 1988

25. Grün, J. - Global denken, vor Ort handeln - Dreisam, 1984

26. Myers, N. (eld.) - Gaia - der Öko-Atlas unserer Erde, Fischer 1984

27. Friedman, Y. - Machbare Utopien - Fischer 4018, 1978

28. Amery, C. - Die ökologische Chance - Süddeutscher Verlag, 1985

29. Lapenna, I. - Esperanto en perspektivo - UEA, 1974

30. Esperanto-Dokumentoj, n-ro 23 E (1986) - La soci-politika, pedagogia, kaj kultura valoroj de Esperanto, UEA 1986

31. revuo "Esperanto", UEA - ĉiu jarkolekto

32. Bookchin, M. - Die Ökologie der Freiheit - Beltz, 1985

33. Bookchin, M. - Por ekologia socio - SAT-Broŝurservo, 1983

34. Privat, E. - Vivo de Zamenhof - The Esperanto Publishing Company, 1977

35. Günther, W. - Letero al MONATO 8/90

36. Guggenberger, B. - Das Menschenrecht auf Irrtum - Hanser, 1987

37. Manifesto de Raŭmo, 1980: en Esperanto

38. MONDHEJMO, 1990-02 (informfolio)

39. Zamenhof, LL. Fundamento de Esperanto, E.F.E. , 1963

40. Fischer, J. - Der Umbau der Industriegesellschaft - Eichborn, 1989

41. Sulco, R. - Pledo por unueca lingvo - Esperanto-Centro Paderborn, 1985

42. Sulco, R. - Sur la vojoj de la Analiza Skolo, Esdperanto-Centro Paderborn, 1987

43. Vogelmann, B. - Der neue Realismus - Baier Verlag, 1988
und
Sperry, R. - Naturwissenschaft und Wertentscheidung - Piper, 1985

44. Piron, C. - La bona lingvo - Eldonejo "Pro Esperanto" - Vieno, 1989

45. GEA - Propono al UEA (1986-05-19) pri ekologia amendo de la UEA-statuto

46. La Sankta Biblio, Genezo, Unua Libro de Moseo, 2:15

## ESPERANTO-KONFERENCO en POPRAD, Ĉekoslovakio, 13-19jul91

Organizata de Milan Zvara, kiu, laŭ la vortoj de K Jakobo en *Esperantumu Slovakie* (LG 29) "sukcesis ĝisvivigi...unikan oazon Esperantistan en Orienta Eŭropo...: la Internacia Kultura kaj Kleriga Centro en Poprad... promenantoj, kaj naturamantoj tre ŝatos la apudan montaron 'Tatra'. Kaj estas 4 ŝtataj parkoj en la Poprad-a distrikto – pli ol en iu alia regiono en Ĉeĥoslovakujo."

Temo: **ESPERANTO KAJ NOVA EŬROPO**

Prelegos Jan Göldrich, Jiri Karen, Herbert Mayer, Vinko Oŝlak, Jean Thierry, Eugène de Zilah, Milan Zvara kaj aliaj.

Gvidos rektmetodan kurson Anton Zacharias.

Libroservo, teatraĵo, diskutoj, distroj, ioj.....

**POSTAJ EKSKURSOJ**

Al naciaj parkoj en montaro Tatra.

Tri tagoj: Prezo, inkluzive hotelo, buso, manĝo ĉirkaŭ 80 ekuoj (160 germanaj markoj.)

**GASTADO**

En la Centro mem, en pluritaj ĉambroj, prezo de kompleta pensiono (tranokto kaj 3 manĝoj), unu tago: ĉirkaŭ 5 ekuoj (9 germanaj markoj).

En hotelo, prezo de tranoktado: proksimume 10 ekuoj (20 germanaj markoj).

**ALIĜKOTIZOJ**

Membroj de OSIEK 47 ekuoj (330 francaj frankoj) ĝis 1feb91. Ne membroj 64 ekuoj (450 francaj frankoj). Rabato: 15 % por paro, 30 % por studento.

Informoj kaj pagoj ĉe la kasisto de OSIEK:

Eric LAUBACHER
53, avenue Henri Barbusse
F-92140 CLAMART
tel. (16 1) 46 45 41 26
**Poŝtĉekkonto: 1 399 87 R PARIS**





## laŭtaj informoj

**PETO** : E-grupo en hungara altlernejo petas, ke E-istoj sendu uzitajn librojn aŭ duoblaĵojn por la E-biblioteko de tiu lernejo. Notu la adreson de la respondeculo : Katalin SMIDELIUSZ, Berzenyi Daniel Tanarkepzö-Föiskola, Károlyi Gáspár tér 4 Pf. 170
H-9701 SZOMBATHELY

******************************

**ANONCETO** : Mi proponas Ĉe-metodan kursgvidadon inter gefamilianoj kaj iliaj infanoj, ekde la 1a de sept. 1991.
S-ro Ĥristo DIMITROV,
Str. Stracin - 16
BG-7300 KOUDRAT.
Tel: 359-0837-43-39.

**DEZIRAS KORESPONDI** pri ĉ.t. Miaj hobioj : fremdaj lingvoj, muziko, sporto, franca kuirarto. 25-jara ĉeĥino ADELTOVÁ J., Fučikova 307, CS-391 02 SEZIMOVU ÚSTÍ

******************************

De la 12a ĝis la 22a de julio '91 **RENKONTIĜO DE E-EDUKISTOJ** (Freinet-pedagogio) okazos en SMARVES, 8 km. sude de POITIERS (Francio). Sin turni al : Paul POISSON, 239 rue Victor Hugo, F-37540 ST CYR SUR LOIRE.

******************************

**E-FEDERACIO "LANGUEDOC-ROUSSILLON"** okazigos sian kongreson en Arles la 13an kaj 14an de Aprilo kun tiu de la Provenca federacio, do temas pri "mediteranea" kongreso. Informas : MJC, Bd. des Lices, F-13200 ARLES

**ESPERANTO-STAĜO** okazos de la 8a de majo je la 16a h. ĝis la 12a de Majo ptm. en Kastelo La Devèze (nova kvartalo), BEZIERS. Dormĉambroj kun 2, 3 aŭ 6 litoj. Personaj kun suplemento : 50 F. Senpagaj littukoj, kunportu tualettukojn.
PREZO : 150 F/tage, do 600 F por la restado. Antaŭpago : 150 F.
Kotizo : 100 F ĝis la 31a de Marto, 150 F poste. Junuloj malpli ol 25-j. ne pagas kotizon.
Pliaj informoj ĉe : C.B.E., 9 rue G. Picot, F-34500 BEZIERS.
Tel. 67.31.13.18 aŭ 67.31.13.46 aŭ 67.38.03.52

******************************

**INTERNACIA JUNULARA RENKONTIĜO**, aranĝita de SAT-Junulfako okazos de la 10a ĝis la 17a de aŭgusto '91. Por ĝi, SAT-JF. serĉas :

* kuraĝajn grimpistojn por venki la plej altan monton en Nederlando - 3250 decimetrojn!
* frenezajn diskutantojn por ataki la temon
* sociemajn esp-istojn por komune prepari langkaresajn manĝojn.

Interesatoj bonvenos en Nederlando! Por ili la organiza skipeto luis ejojn en fera domo "La Zinkviolo", kiu estas parte ankoraŭ funkcianta farmo. La farmo havas herbejon por tendumi kaj luksajn sanitaraĵojn, kiujn ankaŭ tendumantoj rajtas uzi. La ĉambroj havas 12 ĝis 16 lignajn etaĝlitojn.

La kotizo inkluzivas ĉiujn manĝojn, ekskursojn al la historia urbo Maastricht, al la originala karbo-minejo en Blegny, vizitojn al muzeoj kaj entreprenoj en la regiono, luadon de bicikloj, eniron de naĝejo, koncerton kaj lingvokursojn por la kvar onaŭ trionspertuloj kaj komencantoj.

La kotizo varias de 90 ĝis 210 gd. laŭ la aĝo kaj la dato de la aliĝo.

Temo de la debato :
**La sociala Eŭropo**

Adreso : Saskia VEEN
Prof. Nijpelsstraat 19d
NL-6224 BS MAASTRICHT
Tel.: +31-43-623180

***********************************************************************

## FORMORTIS FERVORA S.A.T.-ANO

Gines MARTINEZ, malnova SAT-ano, definitive forlasis nin la 3an de februaro. Kiuj partoprenis en la SAT-kongresoj post la dua mondmilito, tiuj certe memoras pri la impetaj intervenoj de tiu kamarado ĝismedole SAT-eca kaj sennaciista.

Li naskiĝis en Hispanio en la j. 1914; kaj ekesperantiĝis, kiam li estis 20-jara. Konvinkita anarko-sindikatisto li aktive partoprenis en la kontraŭfaŝisma milito de la hispana popolo. Post malvenko, kiel rifuĝinto li spertis koncentrejan etoson en suda Francio. Esperanto tiam multe helpis lin eltenadi dank'al instruado de la I.L. al samsortuloj, kaj korespondado kun francaj samideanoj...

En Angoulême li fine fiksiĝas kaj tuj malfermas E-kurson. Iu el liaj lernantinoj baldaŭ fariĝos lia edzino : Izabela, kiu sindoneme kunagados kaj subtenos lin ĝis lasta sekundo.

Sian tutan vivon li dediĉis al por- kaj per-esperanta agado kadre de S.A.T. En Angoulême, li fondas la klubon "Ĉielarko"; poste kunlaboradas ĉe la Ĉarenta E-Asocio kaj fine estas aktiva membro de la "Groupe d'Action pour l'Espéranto". Oni vidas lin, kun lia edzino, en preskaŭ ĉiuj kongresoj de SAT kaj de SAT-Amikaro. Bedaŭrinde antaŭ ĉirkaŭ dek jaroj grava nekuracebla malsano devigis lin ĉesigi ĉian aktivecon. Lastfoje li ĉeestis SAT-kongreson en Bordozo en la j.1984. Nia asocio perdas fervoran aganton favore al socia digno de la laboristaro.

Al Izabela ni esprimas kun amikeco niajn malĝojajn kunsentojn kaj kondolencojn.

**Leo ROBERT**



MEMORIGE PRI

# LETERO EL NIA MUELEJO

**1) La kondiĉoj de RESTADO en "Moulin de Beauville"**

**La tranoktado**
La tereno taŭgas por tendoj kaj ruldomoj, sed ankaŭ homoj kun nuraj dorsosakoj estas bonvenaj : ili povas tranokti ŝirmite en la iom post iom loĝebligataj konstruaĵoj aŭ en luataj tendoj.

**La manĝoj**
Laŭ la nombro da personoj kaj iliaj deziroj, la partoprenantoj povas aranĝi inter si la preparadon de la manĝoj. Sed ankaŭ "individuistoj" povas aparte elturniĝi... Estas surloke kuirfornoj, kaseroloj, teleraro.

**La restadkostoj**
Minimuma partopreno en la kostoj, por ĉiu persono, tage:

| | |
|---|---|
| - 3 manĝoj <u>kolektive preparitaj</u> | 40 FF |
| - tranoktado en dormejo aŭ tendo* | 10 FF |
| - uzado de akvo, elektro, gaso... | 10 FF |

*) La tranoktado en propra tendo aŭ ruldomo estas senpaga por ĉiu membro de AERA. (Kotizo en 1991 : 20 FF)

**2) La "programoj"**

La programoj de la renkontiĝoj konsistas el la proponoj de la partoprenontoj. Ĉiu ja havas fakon aŭ ŝatokupon, pri kiu ŝi aŭ li pli-malpli kompetentas kaj prezenti ĝin al aliaj partoprenontoj. Eblas krome : ekskursi, botanikumi, ludi, muziki, kanti, ĝardeni, sin bani en la rivereto, eldoni, surbendigi tekstojn, legi el la ampleksa E-biblioteko, verki por **Laŭte!**, debati, labori por pliagrabligi la renkontiĝejon kaj, kompreneble, kune lerni esperanton.

Sur tiu ĉi bazo jam venis jenaj proponoj por junio/aŭgusto:

**De lundo 8a de julio ĝis la 14a de julio 1991:**
Esperanto-kursoj diversnivelaj (2 horojn tage) kaj "programo" kune elektita laŭ la ĉi-supraj kondiĉoj. (Vân)

**De la 5a de aŭgusto ĝis la 12a de aŭgusto** (sed eblas interŝanĝi la programon kun tiu de la sekvanta periodo, miksi la proponojn kaj, kompreneble, aldoni kursojn laŭvole...) →

## Ĉu vi ŝatas rakontojn?

❋ Ĉi-somere en Beauville de la 5a ĝis la 12a de aŭgusto, ni invitas vin rakonti kaj aŭskulti alies rakontojn.

Sed kion ni rakontu ? vi demandos.

Ion ajn, kio ŝajnas al vi rakontinda : anekdoton, libron, filmon, ŝercon, fabelon...

Ĉiuj estas bonvenaj provi siajn kapablojn (talentojn?), certe plibonigi ilin per praktikado kaj dank'al ĉies helpo.

Aŭskulti bele rakontatan historion estas ĝuo. Sed eĉ pli granda ĝuo estas mem kapti la atentajn okulojn de la aŭskultantoj per sia rakonto.

Kial ne ankaŭ vi konu tian ĝuon?

Nu, jam de nun, kolektu en via memoro ĉion, kion vi povos rakonti al ni!

Kaj ĝis la aŭskultado ! (Katrin')

❋ **De la 13a ĝis la 20a de aŭgusto :**
LIBERA RESTADO EN BEAUVILLE

Por lerni, praktikadi, uzi ĉiamaniere nian lingvon, feriu en Beauville :
Alportu kion vi havas por proponi al aliaj (ideojn, temojn por debatoj, dancojn, ludojn...)
... kaj ni kune ellaboros la programon laŭ ĉies proponoj.

**Ĉu iu(j) proponos ion por aliaj periodoj ???**

(Kribo)

*****************************************************

Ĵus aperis : La numero 1 (sed ne la unua, ĉar jam aperis la numero 0) de **ROK-GAZET'**.
Adreso de la eldonanto : EUROKKA, F-31450 DONNEVILLE
La abono kostas 100 FF, sed ĝis fino de marto ĉiu nova abonanto ricevos senpagan ekzempleron de la disketo de **Rozmariaj Beboj** kaj **Amplifiki.**

*****************************************************

Gérant & imprimeur : Baudé, F 47470 Beauville. CPPAP 58651